

Originalo: angla
Traduko: Esperanto

GVIDLINIOJ POR TERMINOLOGIAJ POLITIKOJ

Ellaborado kaj efektivigado de terminologiaj politikoj en lingvaj komunumoj

(Reproduktitaj kun permeso de Unesko)

Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo
de Unuiĝintaj Nacioj – Unesko

Parizo, 2005.

Originalo: angla

(CI-2005/WS/4)

Gvidlinioj por terminologiaj politikoj

*Ellaborado kaj efektivigado de terminologiaj
politikoj en lingvaj komunumoj*

Preparitaj de Infoterm

2005

(Tradukitaj de Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 2012)

La esprimoj uzitaj kaj la prezento de materialo en ĉi tiu eldonaĵo ne implicas esprimon de iu ajn opinio fare de Unesko koncerne la juran statuson de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭ regiono aŭ de ties aŭtoritatoj, aŭ koncerne la fikson de ties landlimoj.

Rekomendita kataloga registraĵo:

Gvidlinioj por terminologiaj politikoj, Ellaborado kaj efektivigado de terminologiaj politikoj en lingvaj komunumoj, preparitaj de Infoterm. – Parizo: Unesko, 2005. – ix, 39 p.; 30 cm. (CI-2005/WS/4).

I Titolo

II Unesko

Administra resumo

Ĉi tiuj gvidlinioj estas adresataj al decidantoj en diversaj postenoj sur diversaj niveloj, kiuj diverscele deziras projekti, plani kaj efektivigi terminologian politikon, adaptitan por konscia, sistema kaj regata aliro al la kreado, prizorgado kaj uzado de terminologiaj produktoj en aŭ por certaj uzokomunumoj.

Terminologia planado jam ludas gvidan rolon en diversaj landoj tra la mondo sur malsamaj niveloj: landa, regiona, lingvokomunuma, loka, institucia aŭ organizaĵa nivelo. Okazas multaj agadoj rilate al terminologia planado ankaŭ sur diversaj profesiaj kampoj kiel kemio, biologio, fiziko, medicino kaj simile. Aldone, preskaŭ ĉiu agado por normigi aŭ harmoniigi, ĉu en la industrio ĉu aliloke, iel rilatas al terminologio. Krome, leĝotipaj tekstoj ĉiam satas je terminologiaj difinoj; laŭ la tradicia onidiraĵo “ne eblas reguligi tion, kio ne estas komprenebla”, kiu signifas “[...] kio ne estas difinita”.

Terminologia politiko aŭ strategio (aparte kiam elpensita kaj efektivigata sur landa nivelo), postulas kalkulon pri kompleksecaj faktoroj

- demografiaj
- kulturaj, etnolingvistikaj kaj geografi-lingvistikaj
- socio-psikologiaj

Ĉiuj ĉi povas efiki sur la sukceson de la rimedoj uzataj. Tiuj faktoroj povas ŝanĝiĝi laŭ la tempo, kio estas punkto prikalkulenda en ĉiu etna kaj lingva komunumo, kiu deziras efektivigi terminologian planadon por kiu ajn celo.

Agadoj rilate al terminologia planado ekaperis dum la ĵus-pasintaj jardekoj:

- sur landa, regiona aŭ loka nivelo
- en interŝtataj organizaĵoj
- en interlandaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-oj)
- en grandaj institucioj kaj organizaĵoj (inkluzive en multlandaj entreprenoj)

Ili evidentiĝas

- en lingvaj komunumoj, ekzemple por evoluigi faklingvojn
- en unuopaj terenoj (t.e. fakoj aŭ alispecaj fakscioj), ekzemple por instigi esploron kaj evoluigon
- lastatempe en novaj aplikadoj kiel perreta komerco, nefiksa telefonio, perreta lernado, perreta sanzorgado, perreta scienco, perreta registaragado kaj plejmulto de la aliaj kampoj de tiaj “perretaĵoj” (agadoj ĉe la interreto)

Sur strategia nivelo oni jam agnoskis la pozitivajn evoluigo-eblojn de sistema terminologia planado (aparte de terminologiaj politikoj) subtene al politikoj por informado, scio aŭ navigado, aldone al strategioj por edukado k.t.p. Per ĉi tiu pli granda konscio, landoj kaj lingvaj komunumoj daŭre pli sentas la bezonon ellaboradi sistemajn terminologiajn politikojn (inkluzive strategiojn rilate al terminologia planado) por plibonigi sian konkurencopovon. Tiu tendenco koincidas kun la postulo, ke necesas kompletigi la nuntempe akceliĝintan tutmondigon per akcelita lokadaptado, t.e. tradukado kaj adaptado por konformi kun lokaj kulturaj kaj lingvaj kutimoj.

Listo de mallongigoj

NRO – neregistara organizaĵo

Unesko – Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj

Antaŭparolo

Ekzistas jam multaj iniciatoj, kiuj celas tiri atenton al la graveco de terminologio en la evoluigo. Sur regiona nivelo, elstara ekzemplo estas la dokumento *Eŭropa ĉarto por regionaj aŭ minoritataj lingvoj*¹ (1992), kiu inkluzivas aspektojn terminologiajn, kiuj substrekas la valoron de multkultureco kaj multlingveco. Tiu ĉarto agnoskas, ke protekti kaj kuraĝigi minoritatajn lingvojn plene kongruas kun konservado de la statuso de oficialaj lingvoj.

Ĉirkaŭ la jaro 2000, Unesko intensigis sian agadon por krei pli vastan konscion pri la grava rolo de lingvoj por transpontadi la ciferecan breĉon kaj konstruadi sciohavajn sociojn. La cifereca breĉo preskaŭ senescepte akompanas malegalecon ĉe aliro al informoj kaj scioj, kio siavice asociiĝas kun malegaleco ĉe lingva aliro. Netaŭga terminologio estas unu ŝlosila faktoro en la malegaleco ĉe lingva aliro, kaj ĝi rezultigas mankon de vivkapabla legoscio en la kuntekstoj de aliro al informoj kaj uzado de komputiloj. La intersekcia kaj multifaka programo de Unesko “**Iniciato B@bel**”² agnoskis la gravecon de multlingveco kaj multkultureco en la epoko de la interreto, kiu substrekiĝis ankaŭ en la *Universala deklaro de kultura diverseco*³ (2001).

Unesko antaŭenigis ankaŭ agadojn por atingi tutmondan aliron al ciferecaj resursoj en ĉiuj lingvoj, por plibonigi la lingvajn kapablojn de la uzantoj, kaj por krei kaj evoluigi ilojn cele al multlingva aliro al la interreto. Tiun intencon fortigis la *Rekomendo pri la antaŭenigo kaj uzado de multlingveco kaj universala aliro al la “kiberspaco”*⁴ (aprobata en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo en oktobro 2003). En la diskutoj, kiuj kondukis al tiu normiga Rekomendo, oni emfazis, ke la lingvo estas kaj restas la ĉefrimedo de interhoma komunikado. Tiu Rekomendo ampleksas ankaŭ terminologiajn aspektojn lige kun evoluigo kaj antaŭenigo de multlingvaj resursoj, kiel ankaŭ de komunikado, informado kaj scio fakspezifaj.

En la procezo, kiun iniciatis la *Monda kunveno pri la informsocio*⁵, Unesko persiste emfazis la lingvon, kaj aparte aspektojn rilate al multlingveco, kiel ŝlosilajn erojn de kultura diverseco kaj universala aliro al informoj kaj scioj. Ĉi-lige, terminologia evoluigo kadre de edukado, sciencoj kaj kulturo estas ŝlosilo por evoluigi sciohavajn sociojn.

Kvankam taksoj pri la nombro de la lingvoj nuntempe ekzistantaj varias, la mezvalora cifero troviĝas inter 6 000 kaj 7 000 (t.e. sen enkalkuli multe pli grandan nombron da dialektoj kaj lokaj variantoj). Daŭre pli ampleksiĝanta amaso da empiriaj atestaĵoj indikas, ke decidiga rilato troviĝas inter unuflanke la ebloj de unuopuloj utiligi sian gepatran lingvon en plena gamo de kulturaj, sciencaj kaj komercaj kampoj kaj aliflanke la socio-ekonomia bonfarto de iliaj respektivaj lingvaj komunumoj. **Homoj, kies gepatra lingvo ne (aŭ ne sufiĉe) evoluis el la vidpunkto de terminologio kaj faklingvoj aŭ al**

¹ Tradukista rimarko: en la angla “*European Charter for Regional or Minority Languages*”.

² Tradukista rimarko: en la angla “*Initiative B@bel*”.

³ Tradukista rimarko: en la angla “*Universal Declaration of Cultural Diversity*”.

⁴ Tradukista rimarko: en la angla “*Recommendation on the promotion and use of multilingualism and universal access to Cyberspace*”.

⁵ Tradukista rimarko: en la angla “*World Summit on the Information Society*”.

kiuj oni ne donas la eblon utiligi sian gepatran lingvon kadre de edukado, trejnado, alirado de informoj aŭ interagado en sia laborloko, tendencas postresti.

Malgrandaj lingvaj komunumoj (inkluzive de lingvaj minoritatoj ĉiuspecaj) devas pli multe klopodi ol la ĉirkaŭaj grandaj lingvaj komunumoj por malhelpi al si flankeniĝon rilate al evoluoj scienc-teknika kaj ekonomi-industria. Tiu faktoro povus konduki fine al socio-ekonomia malprogreso. **Plejofte, se oni limigas la uzadon de iu lingvo al folkloro aŭ al la familia kadro, tiu lingvo ne plu taŭgas por porti fakan komunikadon. Simile lingvo, kiu postrestas en sia terminologio por iu fako, riskas pli kaj pli perdi la kapablon ebligi komunikadon en la pria fako.** Sekve en multaj (aŭ eĉ en ĉiuj) lingvaj komunumoj troviĝas bezono de (daŭra) terminologia planado kaj de konkreta jura, financa kaj administra agado por subteni tiujn klopodojn. Unu tia agado estas efektiviigi terminologian politikon por ĉi-koncernaj lingvaj komunumoj.

La jenaj gvidlinioj celas provizi per metodara helpo por krei kaj efektiviigi terminologian politikon, kiu baziĝas sur kolektitaj klopodoj de lingvoplanado. Oni konceptis ilin cele al uzindeco por ĉiuj landoj kaj lingvaj komunumoj, ekde evoluantaj landoj kaj lingvaj komunumoj kun nematuraj terminologioj ĝis evoluintaj landoj kaj lingvaj komunumoj, kiuj jam posedas altgrade evoluigitajn terminologiojn, grandskale agadas rilate al terminologio kaj ĝuas ekzistantajn merkatojn por terminologiaj produktoj kaj servoj.

Se du aŭ pli da lingvaj komunumoj kunvivas kaj interagas ene de lando aŭ regiono, la pria terminologia politiko devas respeguli tion. Terminologio, samkiel homa lingvo ĝenerale, povas kuntreni diskuteblajn demandojn, aparte se tuŝiĝas pluraj lingvaj komunumoj. Ĉi-rilate la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (1948), la *Interlanda konvencio pri civilaj kaj politikaj rajtoj*⁶ (1966), la *Interlanda konvencio pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj*⁷ (1966) kaj la *Deklaracio pri la rajtoj de personoj apartenantaj al landaj, etnaj, religiaj kaj lingvaj minoritatoj*⁸ (Rezolucio 47/135 de la 18-a de decembro 1992) de Unuiĝintaj Nacioj povas signife gvidadi.

Pro la ĉi-supraj diritaĵoj kaj sciante, ke terminologio nepre uzendas kadre de la kapablo utiligi informojn (inkluzive por ebligi “vivkapabligan legoscion”, scipovon uzi ilojn amaskomunikajn aŭ ciferecajn k.t.p.), Unesko kontraktis kun Infoterm por organizi grupon de fakuloj cele al ellaborado de la jenaj ***Gvidlinioj por terminologiaj politikoj***, kiuj provizas decidantojn kaj politikofarantojn per sistema referenco por ekigi tian politikon subtene al longtempa kaj daŭrigebla evoluigo de sia lando aŭ de sia lingva komunumo. La kontribuintoj al ĉi tiu eldonaĵo havas malsamajn kulturajn kaj sociajn fonojn, kaj rikoltis malsamajn spertojn koncerne la konceptadon, planadon kaj efektivigadon de terminologiaj politikoj, el kio esence rezultas la jenaj gvidlinioj.

⁶ Tradukista rimarko: en la angla “*International Covenant on Civil and Political Rights*”.

⁷ Tradukista rimarko: en la angla “*International Covenant on Economic, Social and Cultural Rights*”.

⁸ Tradukista rimarko: en la angla “*Declaration on the Rights of Persons belonging to National, Ethnic, Religious and Linguistic Minorities*”.

Kontribuintoj⁹

Mariëtta ALBERTS (*PanSALB/Sud-Afriko*)

Basseyy ANTIA (*University of Maiduguri/Niĝerio*)

Albina AUKSORIŪTĒ (*Litovio*)

Gerhard BUDIN (*Universität Wien/Aŭstrio*)

Nelida CHAN (*Kanado*)

Anja DRAME (*Infoterm/Germanio*)

Christian GALINSKI (*Infoterm/Aŭstrio*)

郭传杰 / GUO Chuanjie (*Ĉinio*)

Paul HECTOR (*Unesko*)

홍귀현 / HONG Gwi-Hyeon (*Korea Respubliko*)

Сергей ПАПАЕВ / Sergey PAPAЕV (*VNIKI/ Rusio*)

María Cecilia PLESTED ALVAREZ (*ICONTEC kaj Universidad de Antioquia/ Kolombio*)

PUSZTAY János (*Hungario*)

Bohdan RYTSAR (*Ukrainio*)

Sue Ellen WRIGHT (*Kent State University, Institute for Applied Linguistics/Usono*)

⁹ Tradukista rimarko: kiam la propra nomo de la kontribuinto ne kutime skribiĝas pere de latinaj literoj, la aldonitaj latin-literaj indikoj baziĝas sur la originala dokumento en la angla.

Gvidlinioj por terminologiaj politikoj

Ellaborado kaj efektivigado de terminologiaj politikoj en lingvaj komunumoj

Enhavtabelo

Administra resumo	i
Listo de mallongigoj	iii
Antaŭparolo	v
Kontribuintoj	vii
0 Lingvoj sub la efiko de tutmondigo	1
1 Bazaj nocioj	3
2 Lingvoplanado kaj terminologia planado	5
2.1 Lingvoplanado	
2.2 Terminologia planado	
3 Ellaborado kaj efektivigado de terminologia politiko	14
3.1 Ellaborado de terminologia politiko	
3.2 Efektivigado de terminologia politiko	
3.3 Homa kapablo	
3.4 Rolo de landaj terminologiaj institucioj	
3.5 Privataj iniciatoj	
4 Preparado, ellaborado kaj efektivigado de terminologiaj politikoj	22
4.1 FAZO 1: Preparado por la terminologia politiko	
4.2 FAZO 2: Ellaborado de la terminologia politiko	
4.3 FAZO 3: Efektivigado de la terminologia politiko	
4.4 FAZO 4: Subtenata funkciigado de la terminologia infrastrukturo kaj de la adapta mekanismo por la terminologia politiko	
Resumo	32
Aldonaĵo – Terminoj uzataj en ĉi tiuj gvidlinioj	34
Bibliografio (elekto)	37

0 Lingvoj sub la efiko de tutmondigo

La lingvo estas la ĉefa rimedo por homa komunikado. La rolo de la homa lingvo iĝas pli kaj pli grava en homo-maŝina komunikado kaj pli kaj pli implikita en intermaŝina komunikado. La lingvo, kiel montriĝis dum la pasinta jarmilo de homa evoluo, estas kompleksega fenomeno. Male al la popola percepto, ĝi estas pli ol nura ilo por transigi informojn. La lingvo en siaj kulturaj dimensioj estas proksime ligita al la identeco de komunumoj samkiel de unuopuloj. Oni do ne aparte miru, ke homoj foje emociiĝas pri lingvaj temoj.

La lingvoscienco distingas inter la ĝenerala lingvo (ĉiutaga lingvo) kaj la faklingvo (specifa lingvo). Kvankam ĉi tiu dokumento neniel ignoras la kulturajn kaj emociajn dimensiojn, ĝi koncentriĝas je faklingvo kiel la ĉefrimedo de:

- komunikado kadre de iu kampo (tereno-specifa aŭ profesia komunikado)
- reprezentado de specifaj scioj (tereno- aŭ kampo-specifaj)
- aliro al specifaj informoj (tereno- aŭ kampo-specifaj)

En ĉi tiu kunteksto, ni parolas pri la “faklingvoj” de la diversaj kampo-komunumoj, kiuj okupiĝas pri tereno-specifaj aŭ alispecaj fakscioj. Anoj de tiuj komunumoj ĝenerale konsentas pri siaj propraj lingvokonvencioj, kiuj ne necese plene kongruas kun la konvencioj de la ĝenerala lingvo. Ĉar la moderna socio troviĝas forte sub influado de scienc-teknikaj evoluoj, faklingvoj daŭre pli forte efikas sur la evoluon de la koncerna ĝenerala lingvo.

Ĉar la scienco kaj teknologio estas la fundamentoj de ekonomia kaj socia evoluo, la interagado inter la lingvo kaj la ekonomia agado estas, el ĝenerala vidpunkto, tute memevidenta. Oni pli kaj pli agnoskas, ke la “relativa forteco” de la lingvo de iu lingva komunumo emas respeguli – post ioma tempodaŭro – la ekonomian sukceson de tiu lingva komunumo. Sekve, la faklingvo nuntempe pli grave rolas en diskutoj rilataj al lingvoplanado kaj en la efektivigado de programoj rilataj al lingvoplanado. Tamen, pro la superversanta komplekseco de la lingvoplanado, kiu ampleksas kaj la ĝeneralan lingvon kaj la faklingvon, eblas kaj konsilindas apartigi ĉi tiujn du aspektojn. Tiu decido ebligas pli bone organizi la efektivigadon de programoj kaj kontroli plenumadon. Tiel programoj por landolingva evoluigado povus koncentriĝi pri evoluigado de la ĝenerala lingvo kaj kunlabori kun la landaj programoj de terminologia evoluigado rilate al la sistema evoluigado de la faklingvo (ĉefe per terminologia planado).

En la nuna fazo de konsiderado, oni devas agnoski, ke la terminologio estas nekontraŭdireble la plej grava ero de faklingvo. La terminologio ludas kernan rolon kie ajn kaj kiam ajn kampo-specifaj informoj estas:

- generataj (ekz. kadre de esplorado kaj evoluigo)
- uzataj (ekz. en fakaj tekstoj)

- registrataj kaj prilaborataj (ekz. en datumbazoj)
- pludonataj (pere de trejnado aŭ de instruado)
- efektivigataj (ekz. en teknologio kaj sciotransigo)
- tradukataj kaj interpretataj

Kiel sekvo, la nuntempa terminologia planado devas rigardiĝi el la multe pli vasta perspektivo de navigado kaj de strategioj pri informado, scio kaj eĉ ciferecaj resursoj. Iu lingva komunumo, en kies lingvo sciencaj kaj teknikaj terminologioj ne evoluis, estas neeviteble devigata uzi iun alian, pli evoluintan fremdan lingvon por kampo-specifa komunikado. Pro tio, ke nuntempe informado- kaj komunikado-celaj teknologioj ĝenerale multe subtenadas komunikadon, terminologia manko nerekte, sed neeviteble, starigas ciferecajn breĉojn, kiuj povas evidentiĝi en diversaj manieroj.

La evoluo de informado- kaj komunikado-celaj teknologioj akcelas la evoluon de sciohavaj socioj, speciale per la kunkurigo de telekomunikado kaj komputila teknologio, kun la tendenco kunigi nefiksajn komputadon kaj komunikadon. Dum informado- kaj komunikado-celaj teknologioj pli kaj pli ĉien penetras, troviĝas akcentita bezono de kapablaj kaj efikaj metodoj por uzi ilin. La kostoj de la aparataro kaj de la programaro por informado- kaj komunikado-celaj teknologioj laŭgrade malpliĝas, dum la kostoj de kreado kaj uzado de resursoj (enhavoj) laŭgrade pliiĝas. La ĉi-lastaj estas plej ofte “kaŝitaj kostoj”, kiuj validas ne sole por unuopaj institucioj kaj organizaĵoj, sed ankaŭ por lingvaj komunumoj. Tiurilate terminologioj ludas decidigan rolon, ĉar terminologiaj datumoj estas nemalhaveblaj eroj de kampo-specifaj informoj kaj scioj (kiuj ampleksas grandan parton de la resursoj ĝenerale). Sekve, terminologia planado, kombine kun sistema evoluigado de la rilataj homlingvaj teknologioj povas igi strategiajn evoluigo-eblojn eksponentiale pli efikaj.

La relativa evolunivelo de iu lando mezureblas per la meza kapablo de ĝiaj civitanoj uzi informojn por sciotransigo kaj kapabligo. Ĉar terminologiaj datumoj konsistigas la kernan eron de ĉiuj ajn kampo-specifaj informoj kaj scio-reprezento, la haveblo kaj alireblo de tiuj datumoj estas decidigaj socio-ekonomiaj faktoroj. Ĉi tiuj gvidlinioj atentigas la spertojn akiritajn en multaj lingvaj komunumoj kaj landoj kun agadoj rilate al lingvo kaj al terminologia planado. La gvidlinioj rekomendas movon, en certa fazo dum lingvoplanado, al sisteme konceptita kaj efektivigita terminologia politiko lige al kampo-specifa komunikado.

1 Bazaj nocioj

En ĉi tiu dokumento, **komunikado** limiĝas al la signifo de interhoma komunikado, kiu konsistas el (pervorta) komunikado en parola aŭ skriba formo aldone al nepervorta komunikado. **Kampo-specifa komunikado** uziĝas por specifa (t.e. scienc-teknika aŭ profesia) komunikado kadre de iu **kampo**. En pragmata senco tio inkluzivas scienc-teknikajn terenojn aŭ alispecajn terenojn de fakscioj. La signifo de **teknika komunikado** ĉi tie ne estas tiu de teknologioj por komunikado, sed tiu de teknika verkado aŭ de teknika dokumentado, t.e. la preparado de dokumentoj, kiuj verkiĝas per faklingva tekstado aŭ kiuj plejparte entenas faklingvan tekstadon. **Terminologia planado** evoluigas la lingvon grandparte laŭ la bezonoj kaj postuloj de kampo-specifa komunikado.

Faklingvo signifas la lingvon, kiun uzas fakaj komunumoj, kun granda aŭ malgranda rolado de terminologio kaj kampo-specifaj lingvokonvencioj. Faklingvo devias variamplekse disde **ĝenerala lingvo** (ĉiutaga lingvo), t.e. la lingvo uzata grandparte por ĉiutagaj celoj de iu ajn lingva komunumo. Povas ekzisti ĉiaj variantoj (kiel ekz. dialektoj), kies konvencioj devias de la tiel nomata **lingva kutimo**, kiu konsistas el la aro da lingvaj konvencioj, kiujn oni konsideras kiel la komunan lingvan normon de la pria lingva komunumo. Ĝeneralaj lingvoj estas la lingvoj de unuopaj lingvaj komunumoj, dum faklingvoj estas la specifaj lingvoj, kiujn uzas kampo-specifaj fakaj komunumoj ene de lingva komunumo.

Teknologio daŭre pli aplikiĝas ankaŭ al la lingvo, nome **lingvo-inĝenierado** ekaperis kiel fako, kiu celas **naturalingvo-pritraktadon**. La teknologioj kiuj devenas el lingvo-inĝenierado nomiĝas **homlingvaj teknologioj**. Ili aplikas la scion pri la lingvo por evoluigi komputilajn sistemojn kiuj povas identigi, kompreni, interpreti kaj generi ĉian homan lingvon. Alivorte, por evoluigi programojn, kiuj ebligas al homoj interagi rekte kun komputiloj.

Terminologia scienco estas la fako, kiu esploras la strukturon, formadon, evoluon, uzadon kaj administradon de **terminologioj** en diversaj fakoj, kaj kiu preparas la metodaran bazon por multaj aplikoj. **Terminologiaj iloj** (plejparte komputilaj programoj por apliki terminologion) uziĝas por pritrakti terminologiajn datumojn en iu aŭ tiu maniero, diverscele. Ekzemple **terminologiaj administrado-sistemoj** estas celataj kiel iloj por registri, konservi, prilabori kaj eligi terminologiajn datumojn laŭ aprobitaj profesiaj principoj. Landa **terminologia datumbazo** povas enhavi unulingvajn aŭ plurlingvajn datumojn kaj stariĝi sur la nivelo de iu lando, iu lingva komunumo aŭ iu loko depende de la bezonoj de la koncernaj komunumoj. Por terminologia planado kaj aparte kadre de landa terminologia politiko, oni ofte uzas terminologian datumbazon kiel unu el la unuarangaj iloj por efektiviĝi tiun politikon. Ankaŭ kreo de centritaj terminologiaj datumbazoj estas efika strategio por firmaoj kaj aliaj organizaĵoj aŭ institucioj, kvankam retoj el disaj kaj federaj terminologiaj datumbazoj pli kaj pli anstataŭas subtenadon de grandaj terminologiaj datumbazoj.

Agadoj rilate al terminologio povas rezultigi diversajn **terminologiajn produktojn**, kiel ekzemple terminologiajn normojn, faklingvajn vortarojn (terminarojn), glosarojn, terminologiajn datumbazojn k.s. Por efektiviĝi landan terminologian politikon, kutime uziĝas iloj kiel terminologiaj produktoj kaj **terminologiaj servoj**, ekzemple servoj de

terminologia konsilado kaj trejnado, priterminologia informado kaj dokumentado, alilokigoj de terminologiaj taskoj, informservoj k.t.p. En lingvaj komunumoj kun alte evoluintaj agadoj rilate al terminologio, terminologiaj produktoj kaj terminologiaj servoj servas la **terminologian merkaton**, kiu konsistas el uzantoj kaj provizantoj per terminologiaj produktoj kaj terminologiaj servoj.

Landa terminologia politiko estas publika strategio ellaborita sur la nivelo de politika decidado en lando aŭ en pli-malpli memstara lingva komunumo (ene de lando aŭ de regiono, kiu situas ambaŭflanke de la limoj de du aŭ pliaj landoj) kun la celo evoluigi kaj reguligi aperantajn kaj ekzistantajn terminologiojn por aro da celoj. Sperto montras, ke malsamaj uzantaroj bezonas terminologiajn datumojn kun malsamaj gradoj de komplekseco kaj detaleco por diversaj celoj. Sekve, oni ŝparegas se oni preparas multcelajn terminologiajn datumojn jam de la komenco por diversaj uzantoj kaj aplikoj. Sammaniere, estas konsilinde elpensi sian landan terminologian politikon kiel plurlingvan kaj neekskluzivan jam de la komenco. Ĉio ĉi aplikiĝas ankaŭ al terminologiaj politikoj aŭ strategioj en la privata sektoro, kiel ekzemple en entreprenoj, NRO-j, fakaj asocioj k.t.p.

2 Lingvoplanado kaj terminologia planado

Ĉi tiu ĉapitro kontrastigas lingvoplanadon kaj terminologian planadon, kiuj nuntempe jam estas komplementaj agadoj. Ambaŭ agadoj respegulas multajn kriteriojn, inkluzive la politikan kuntekston, la historian komenciĝon de lingvo-uzo, la socio-ekonomian situacion, geografi-lingvistikajn aspektojn, kaj demografiajn, kulturajn kaj psikologiajn faktorojn, kiuj ĉiuj tiam ludas rolon, kiam oni analizas sociajn koncernatojn (ankaŭ instituciojn) kaj ĉi ties interrilatojn.

2.1 Lingvoplanado

Ĉar ĉi tiuj gvidlinioj celas ĉefe la terminologian planadon, aperas ĉi tie nur mallonga enkonduko en la teorion de la lingvoplanado. Ili aparte emfazas elmontrandon de la pozicio de la terminologio kadre de la lingvo kaj de la komunikado. Pli larĝaj demandoj sur la kampo de la lingvoplanado estas traktataj en diversaj eldonaĵoj de Unesko.

2.1.1 Superrigardo al la teorio pri lingvoplanado

Demando povas stariĝi, ĉu lingvoplanado estas necesa aŭ eĉ ĉu ĝi eblas. Gadelii (1999) pravigas lingvoplanadon en la sekva maniero:

La socio evoluas kaj la lingvo devas adaptiĝi al la realo. Oni faras politikajn decidojn, kiuj foje povas signifi, ke novaj komunumoj kreiĝas, kiuj povas malhavi komunan interkomunikilon. En tiaj okazoj, lingvoplanado estas dezirinda kaj fakte necesa.¹⁰

La historio de la scienco liveras atestojn pri multaj ekzemploj de pli-malpli sukcesaj intervenoj pri la natura evoluo de lingvo. Kondiĉe ke ĉi tia intervenado koncernas ekzistantajn, naturajn lingvojn, ni parolas pri “lingvoplanado”. Tio, kion ni hodiaŭ nomas en la angla “*language planning*” (lingvoplanado), estis en la pasinteco diverse nomata, ekzemple en la angla *glottopolitics* (lingvopolitiko), *language engineering* (lingvo-inĝenierado), *language regulation* (lingvoreguligo) aŭ *language development* (lingvo-evoluigo). Post komparado de 12 difinoj, Cooper (1989) estigis sian propran, jenan difinon:

La lingvoplanado temas pri intencaj klopodoj influi la konduton de aliaj rilate la akiron, la strukturon aŭ la funkciajn asigنون de iliaj lingvaj kodoj¹¹


Cooper mem diras, ke li intence elektis tre larĝan difinon por eviti limigojn rilate al registaraj agadoj, specifaj celgrupoj aŭ ia speciala metodaro.

¹⁰ Tradukista rimarko: la Esperanta citaĵo estas propra traduko el la jena angla teksto: “*Society is developing and language has to adjust to reality. Political decisions are taken and this may mean that new communities are created which may lack a common means of communication. In cases such as these, language planning is desirable and indeed necessary*”

¹¹ Tradukista rimarko: la Esperanta citaĵo estas propra traduko el la jena angla teksto: “*Language planning refers to deliberate efforts to influence the behaviour of others with respect to the acquisition, structure, or functional allocation of their language codes*”.

La lingvoplanado nuntempe necesigas multe pli ol simplan kreadon de vortoj kaj de terminoj kaj ol elpensadon de literumreformoj. Ĝi kuntrenas ekologian aliron al la lingvo, kiu estas decidiga ero en homaj socioj, kaj ĝi inkluzivas multoblajn socio-lingvosciencajn faktorojn. La lingvoplanado ampleksas miksaĵon el metodoj kaj aliroj, inkluzive de terminologio aŭ leksikografio, terminologia administrado, tradukado kaj tradukada administrado, kaj daŭre pli inkluzive de aliroj bazitaj sur tekstaroj (termino-eltirado, tekstara analizado por rimarki neologismojn fabrikitajn inter parolantaroj k.t.p.). Ankaŭ ĉi-rilate la uzado de homlingvaj teknologioj kreskadadas.

En la angla lingvo, oni proponis la terminon *communication planning* (komunikada planado) por inkluzivi la lingvoplanadon kaj ian ajn alian plancelan agadon lige kun interhoma komunikado, sendepende de la demando, ĉu la pria agado estas striktasence lingve direktita aŭ pli larĝasence organiza, teknika kaj infrastruktura. Ĉi-sube, bildo 1 ilustras komunikadan planadon kiel la superan terminon por lingvoplanado kaj terminologia planado.



Bildo 1: Superrigardo al kelkaj nocioj rilate al komunikada planado

Bildo 1 krome provizas per superrigardo al la rilatoj inter tiuj nocioj. La listigo sub "ĝenerala lingvo" indikas erojn, kiuj estas parto de la kutima difino de tekstaro-planado. Tekstaroplanado inkluzivas agadojn kiel konceptado kaj reformado de ortografio (inkluzive normigon de skribmaniero), elekto de skribsistemo, decidado pri elparolmaniero de vortoj, ampleksigo de la kaj ĝenerallingva kaj faklingvaj vortprovizoj, ŝanĝoj en la gramatika sistemo, pritraktado de dialektoj kompare kun la kutima aŭ normigita formo, eldonado de legolibroj kaj manlibroj por subteni legokapablon, evoluigo de vortaroj, gramatikoj, simpligitaj faklingvaj glosaroj, kreado de beletro, subtenado de kreaĵoj (t.e. muziko, eldonado, vidaj artoj k.t.p.), kaj ankaŭ kreado de

institucioj, kiuj pritraktu lingvajn demandojn. Tamen la lingvoplanado inkluzivas ankaŭ aspektojn de statusoplanado kiel ekz. asignado de lingvo al diversaj kampoj de la socio (en komercaj, edukadaj, kortumaj, administradaj, amaskomunikilaj institucioj k.t.p.).

2.1.2 Bezono de lingvoplanado

La bezono de lingvoplanado kaj de rilata politiko povas aperi pro diversaj kialoj:

- Plur- aŭ multlingveco: nur malmultaj landoj, kiel Islando, povas pretendi esti esence unulingvaj. Dume la plejmulto de la landoj tra la mondo kutimas pri multlingveco. Por efike respekti homajn rajtojn, eĉ oficiale unulingvaj landoj devas akomodi sin al kaj atenti pri aliaj lingvogrupoj, kiuj havas statuson de minoritato ene de la priaj ŝtataj landlimoj. Multaj landoj, kiuj decidas proklami unu aŭ pli da lingvoj kiel la oficialan komunikilon, okupiĝas pri sistema lingvoplanado. Tamen, en konstitucioj ofte mankas eksplicita mencio de la lingvo(j), kiu(j) estas ŝtatagnoskita(j). Aldone al oficiale agnoskitaj lingvoj, aliaj lingvoj eventuale estas uzataj en la edukado aŭ en aliaj sektoroj, depende de la surlokaj bezonoj.
- Edukado: la avantaĝoj de dekomenca edukado per la gepatra lingvo, agnoskitaj de Unesko, ankoraŭ estas nehaveblaj por milionoj da infanoj tra la mondo pro la fakto ke fremdaj lingvoj estas uzataj en la frua lerneja instruado. Kiam la gepatra lingvo ne estas uzata kiel instruperilo, ofte la sekva rezulto estas granda kvanto da lernantoj, kiuj frue forlasas la lernejon aŭ/kaj ne kapablas legi.
- Teknologioj por komunikado: kiel ĉi-supre menciite, daŭre pli troviĝas bezono por plenumi la ciferecan breĉon inter evoluintaj landoj kaj evoluantaj landoj. Lingvoplanado signifas ankaŭ privedi kaj evoluigi lingvaĵojn cele al uzado en komputilaj komunikiloj (ekz. por uzado en homlingvaj teknologioj).

Aldone al tiuj faktoroj, la lingvo-sistemo estas samvalora kiel krudmaterialoj de la naturo kaj tial decidiga punkto en la ekonomia bonfarto de iu ŝtato kaj en la riĉeco de ĉi ties popolo(j). Tiu aserto aparte validas en plur- aŭ multlingvaj socioj. Sekve, kadre de ŝtata plano por evoluigado prisocia, priekonomia kaj prikultura, oni devus pritrakti la lingvo-sistemon kiel integran eron. Iu lingvo (se ĝuste pritraktata), samkiel aliaj krudmaterialoj, konstituas potencon por kreado de laborpostenoj.

2.1.3 Celoj de lingvoplanado

Kelkaj el la plej gravaj celoj de lingvoplanado inkluzivas:

- kontroladon de la nivelo de lernantoj, kiuj tro frue forlasas la lernejon en plur- aŭ multlingvaj kunteksto kaj prian plibonigadon de la alirebloj al formala edukado, t.e. per realigado de edukado *pri* la gepatra lingvo kaj de edukado *per* la gepatra lingvo, nelaste por lernantoj en juna infana aĝo (ekz. en infanĝardeno kaj en la postaj unuaj jaroj en lernejo)
- kreadon de la plej bona medio por lernadi per certigo, ke la matematiko kaj sciencoj estu instrueblaj en lingvo komprenata de la lernantoj

- plibonigadon de la kvalifikoj de ŝtataj kaj aliaj dungitoj, de sciencistoj, esploristoj, instruistoj aŭ eĉ de metiistoj, kio konsistigas investaĵon en la ekonomian potencon de la ŝtato
- altigadon de la kultura diverseco kaj individueco de lando pere de flegado de artoj en la diversaj priaj lingvoj
- malhelpadon de etna kaj politika malkontento flanke de la popolanoj per kreado de medio, kiu baziĝas sur la principo de lingva egaleco (alivorte egalrajta traktado de ĉiuj lingvoj de la lando, aparte en oficialaj sektoroj de la socio kiel leĝofarado, juro, publika administrado kaj edukado). Oni samtempe zorge atentu eventualajn malsamajn evolustadiojn de lingvoj, kiuj uziĝas unu apud la alia
- certigadon de demokratio per ebligado de informado kaj de propraj politikaj decidoj al la popolanoj
- plenigadon de la cifereca breĉo per evoluigo de lingvaĵoj cele al uzado en komputiltipaj komunikiloj (kiel subtenadon de homlingvaj teknologioj, maŝintradukado k.t.p.)
- provizadon al anoj de la pria lingva komunumo per vortaroj, manlibroj, verkoj el t.n. “kreaĵoj”, lernejaĵoj, gazetoj k.t.p., en ĉi ties gepatra lingvo

2.2 Terminologia planado

Kontraste kun lingvoplanado, kiu eventuale tiam komenciĝas, kiam sur la lingvo-evolua nivelo ne ekzistas skriba lingvo kaj kiam realaj lingvaj kutimoj same ankoraŭ ne ekzistas, terminologia planado siaflanke apogas sin sur la ekzisto de lingvaj kutimoj kaj sur iugradaj gramatika kaj ortografia stabilecoj de la skriba formo de la lingvo. La terminologia planado sur tiu bazo konscie kaj sisteme evoluigas faklingvaĵojn laŭ la bezonoj kaj postuloj de la kampo-specifa komunikado, ĉe kiu granda kvanto da novaj teknikaj terminoj ĉiutage kreiĝas en centoj da lingvoj tra la tuta mondo. Ĉi tiuj terminoj formas terminarojn en kiuj ĉiu aparta termino havas sian fakan signifon (reprezentas unuopan nocion), kiu uziĝas en la pria faklingvo aŭ en specifa kampo. Unuflanke povas okazi terminologia evoluo, kiu estas natura, neevitebla fenomeno, sed aliflanke oni povas okazigi terminologian evoluigon, t.e. iniciaton por plenumi celon kaj kiel parton de lingva evoluigado kaj samtempe kiel ilon por efektivigi politikojn, kiuj celas ŝanĝojn socio-ekonomiajn.

Por kompreni pri kio temas terminologio, oni konsideru la sekvan priskribon de “fluorklorarbonhidrogenaĵoj” el Vikipedio¹²:

“Fluor-klor-karbon-hidrogen-aĵoj (mallonge FKKH) kaj klor-fluor-karbon-aĵoj (KFK) estas granda aro da organikaj ligoj. Ili estas karbonhidrogenoj kiel metano kaj butano, en kiuj anstataŭiĝis la hidrogen-atomoj per la halogeno, kloro aŭ fluoro. FKKH-molekuloj, kiuj neentenas hidrogenon, nomiĝas KFK-oj. FKKH-oj estas tre persistaj, nebruleblaj [nebruligeblaj] kaj kutime ne aŭ nur malmulte venenas. Tial ĉi-gasoj pli kaj pli uzatis en teĥnika medio ekde la 1930-aj jaroj, precipe kiel malvarmigajoj kaj kiel enteno de malbruligiloj, sed ankaŭ kiel propelaĵoj por ŝaumaĵoj. En la 1980-aj jaroj oni eksciis ke FKKH detruas la ozonon en la supera atmosfero.”

Oni supozu, ke la ĉi-supra citaĵo estas kunigo el du derivitaj tekstovariaĵoj, t.e. ke la unua tekstovariaĵo konsistas nur el la **teksteroj (vortoj) de la ĝenerala lingvo** en la defaŭlta **tiparo nigrakolora** (kiel videblas en la ĉi-supra ekzemplo) dum la dua tekstovariaĵo konsistas nur el la **teksteroj (terminoj) de la pria faklingvo**, kiuj aperas en **tiparo grizkolora**. La nigrakoloraj teksteroj sole per si mem ne estas sencohavaj al iu ajn, sed la grizkoloraj teksteroj estus (pro iuj semantikaj rilatoj, kiuj ligiĝas kun ia intuitiita gramatiko) sencohavaj al la plejmulto da interesatoj pri media kemio. La klarigo pri tiu ĉi fenomeno kuŝas en la funkcio de terminoj: nome terminoj enkodigas la substancon de kampo-specifaj scioj. En la citaĵo, la teksteroj de la ĝenerala lingvo servas nur kvazaŭ gramatika kaj sintaksa gluilo, kiu adherigas la terminojn kiel decidigajn erojn kaj kiu tiel kreas koheran, kunteniĝantan tutajon.

Terminoj (kaj la nocioj, kiujn ili reprezentas) estas ne nur esencaj en la procezo de komprenado, sed ili estas ankaŭ nemalhaveblaj por diversaj celoj (ekzemplitaj en la ĉi-supra citaĵo), kiel:

- tradukado: kiel oni diras “fluor-klor-karbon-hidrogen-aĵoj” en via gepatra lingvo?
- serĉado kaj retrovado de informoj: kiel oni serĉu iujn informojn, ekz. similajn tekstojn en la interreto pere de serĉilo?
- dokumentado: kiel oni ordigu dokumentojn en oficeja arkivo tiel ke oni povu trovi kaj reuzi ilin, eĉ post multaj jaroj?
- komunikado: se oni estas ekz. studento, instruisto, spertulo pri medio k.t.p., kiamaniere oni ricevu aŭ transdonu la informojn kaj sciojn el la ĉi-supra ekzemplo al ekz. leĝofaranto aŭ civitano?
- edukado: kiel oni instruu ege fakajn temojn al junaj lernantoj, studentoj, metilernantoj, spertuloj k.t.p.?

Konklude terminologian planadon oni povas adapti al multaj aplikoj kaj ĝin efektivi en kuntekstoj, ĉe kiuj ankaŭ la plejmulto de la aliaj aspektoj de la agadoj rilate al

¹² Tradukista rimarko: la citaĵo estas prenita de Vikipedio je 2012-08-12. En la originala teksto en la angla aperas samnoci-rilata difino, kiu estis prenita de alia fonto kaj diskutita en la libro de ANTIA (vidu bibliografion).

terminologio jam okazas aŭ estas bezonataj. Sekve, oni nepre aparte insistu pri la bezono de sistema aliro kaj pri la necesa kunordigado.

2.2.1 Metodoj por la kreado de terminoj kadre de terminologia planado

Terminoj povas esti *simplaj* aŭ *kompleksaj*, t.e. konsisti respektive el unu vorto aŭ el pluraj vortoj aŭ vortgrupoj kun specifaj morfosintaksaj kaj morfosemantikaj trajtoj, kiuj estas ne nepre konataj en la ĝenerala lingvo sed specifaj en iuj kampoj. Krome, ne sole terminoj (aŭ termino-eroj) povas reprezenti iun nocion, kaj oni do devas distingi inter diversspecaj nomindikoj. Plie, ĉiam estas malfacile distingi vortojn disde terminoj, terminojn disde neterminoj, aŭ nomojn disde terminoj. La maniero laŭ kiu oni kreas novajn terminojn dependas de la funkcia rolo, kiun plenumos tiuj nomindikoj (la terminoj) en la pria kampo-specifa komunikado. En tekstara analizado, termino-eltirado kaj termino-identigado estas malfacilaj procezoj. Spite al intensa esplorado, oni ankoraŭ ne evoluigis absolute fidindajn teoriajn metodojn kaj ĉi-konformajn algoritmojn. Tamen, kadre de homlingvaj teknologioj, ekzistas ja metodoj kaj iloj, kiuj liveras kontentigajn rezultojn por termino-identigado kaj termino-eltirado el tekstaroj. Tiuj uziĝu kiam ajn ili konvenas (sed oni konsciu pri iliaj esence propraj limoj).

La reciprokaj influoj de faklingvoj kaj de la ĝenerala lingvo estas tre dinamika. Estas konstanta fluado de lingvaj eroj en ambaŭ direktoj:

- malterminigo aŭ malterminiĝo: kampo-specifaj terminoj eniras la ĝeneralan lingvon kiel vaste konataj vortoj
- terminigo aŭ terminiĝo: vortoj de la ĝenerala lingvo estas transformataj al termineroj aŭ terminoj
- aktualaj principoj por kreado de terminoj: la ĉi-malsupraj semiotikaj principoj aplikeblas esence al “ĉiuj” lingvoj. Tiuj principoj koncentriĝas sur la sistemeco de terminaroj kun ĉi ties rilataj nocio-sistemoj (ili inkluzivas la kognan kaj scio-reprezantan aspektojn k.s.):
 - travedebleco (kontraŭ maltravedebleco)
 - kongruenco
 - celkonveneco
 - koncizeco (laŭ la principo de lingva ekonomio)
 - derivokapableco
 - lingva ĝusteco aŭ boneco
 - prefero al la pria lingvo (escepte en kampoj aŭ lingvoj, ĉe kiuj ekzistas aliaj tradicioj, kiel ekzemple uzado de latin- aŭ grek-devenaj formoj en iuj fakoj)
- metodoj por la kreado de terminoj:
 - kreado de novaj formoj:
 - per derivado
 - per kunmetado
 - per mallongigado
 - per uzado de estantaj formoj:

- per ŝanĝado de la gramatika kategorio
- per terminigado (uzado de estantaj terminoj el pli aŭ malpli rilataj fakoj kiel novaj sed ofte similsignifaj terminoj aŭ uzado de ili en metafora signifo, kaj simila transformado de vortoj de la ĝenerala lingvo al terminoj)
- per semantika transportado ene de faklingvo
- per elpruntado ene de lingvo, de unu fako al alia (metafore)
- per elpruntado el fremda lingvo:
 - per rekta elpruntado
 - per paŭsado

La supre menciitajn metodojn oni taksu laŭ ilia aplikebleco en ĉiu lingvo. Semiotikaj principoj servu kiel gvidlinioj pri tio, kiel apliki metodojn por la kreado de terminoj. Kelkaj el tiuj principoj kontraŭdiras unu la alian, kio rezultigas decidajn kompromisojn en ĉiu aparta okazo (ekz. travidebleco kontraŭ koncizeco de terminoj). Tio kaj pliaj detaloj troveblas en la normo ISO 704 kaj aliaj rilataj interlandaj normoj (vidu la bibliografion).

Aktualaj problemoj kaj defioj kadre de la kreado de terminoj inkluzivas ankaŭ malakordojn rilate ĝeneral-lingvistikajn modelojn en morfologio, diversecon kaj neinterkongruecon de reguloj el diversaj kampoj (aparte tiuj de natursciencoj kun specifaj nomenklaturetoj), mankon de detaloj en la priskribo de multaj lingvoj kaj bezonon de plena kodigo de tiuj lingvoj (ekz. pere de lingvoplanado) por havebliĝi fidindajn regulojn cele al terminologia evoluigado (aparte rilate ortografion, skribmanieron, elparoladon kaj gramatikon). Kadre de homlingvaj teknologioj troviĝas bezono de aŭtomatigitaj modeloj cele al kreado de terminoj en la pritraktendaj lingvoj.

2.2.2 Terminologia laboro priskriba kaj preskriba

Novaj terminoj regule eniras lingvon, aŭ por plenigi truon, kiu kreiĝis pro enkonduko de nova nocio, aŭ por anstataŭi ekzistantan, malpli taŭgan terminon. Por trakti tian terminologian evoluon, ekzistas du aliroj, t.e. unuflanke *priskriba* terminologia laboro, kiu estas nura observado kaj analizado de la apero de terminoj, kaj aliflanke *preskriba* terminologia laboro, kiu konsistas el interkonsento inter la uzantoj cele al adoptado de termino por komuna kaj ripeta uzado en certaj kuntekstoj. Preskriba terminologia laboro inkluzivas terminologiajn unuigon, normigon kaj harmoniigon. La motivoj por terminologie normigi povas baziĝi sur ĉiaj komercaj kialoj aŭ rezulto el konsideroj pri sekureco.

Terminologia normigado preskaŭ ĉiam kuntrenas elekton inter konkurantaj terminoj. Tiu elekto povas esti influita de pluraj faktoroj, ekz. ŝpareco (termino elektiĝu, ĉar ĝi estas pli traktebla ol aliaj), precizeco (termino havu pli da klareco aŭ da travidebleco ol aliaj), celtrafeco (termino ne kuntrenu ĝenajn aŭ politikajn kromnociojn).

Terminologia normigado kovras du apartajn aspektojn, kiuj respegulas du malsamajn infrastrukturojn. La normigado de terminologiaj principoj kaj metodoj okazas kadre de horizontalaj infrastrukturoj per tio, ke ĝi tratanĉas preskaŭ ĉiujn kampojn. Kontraste al

tio, la normigado de terminaroj sur diversaj terenoj (t.e. terminologia laboro estas nuntempe farata precipe ene de teknikaj komitatoj) respegulas vertikalajn infrastrukturojn. Kompreneble, la normigado de terminaroj devus baziĝi sur normigitaj principoj kaj metodoj, kiuj siavice devus baziĝi sur sciencaj teorioj. Sur la interlanda nivelo, la teknika komitato ISO/TC 37 “Terminologio kaj aliaj lingvaj kaj enhavaj resursoj” traktas la normigadon de principoj kaj metodoj de terminologia laboro.

2.2.3 Terminologia administrado

Kiel jam menciite, terminologio kiel scienco estas altgrade interfaka kampo. En la praktiko, do, necesas kunlaborado inter fakuloj el pluraj kampoj. Pro la nura kvanto da terminologiaj datumoj, kiel eble plej multe da homoj kunlaboru kaj dividu klopodojn kaj rimedojn:

- Terminografio kaj leksikografio: laŭ tradiciaj difinoj, la terminografio estas nocio-bazita, dum la leksikografio estas vorto-bazita. En la realo troviĝas neniu klara distingo: abundas hibridaj metodoj, kio kondukas al etaj diferencoj en laborfluo kaj, pli grave, al anomalioj rilate la datumajn strukturojn. Koncerne la kontraŭajn tendencojn vorto/signifo unuflanke kaj termino/nocio aliflanke, oni povas observi kunfluan de metodoj. Krome survojas provoj por faciligi kunfunkcipovon inter heterogenaj sistemoj.
- Priskriba kaj preskriba labormanieroj: kadre de terminologia administrado, la unuaj paŝoj ĝenerale kuntrenas dokumentadon pri la diverseco ene de kaj trans kulturaj, lingvaj, fakaj, profesiaj kaj korporaciaj limoj. Dum duaj paŝoj ofte necesas, por specifaj celoj, malgrandigi tiun kompleksecon per terminologia normigado aŭ terminologia harmoniigado kaze ke la leksiko ne estas unueca (okazas t.n. leksika diseriĝo) ene de la sama socitavolo.

Terminografio estas la procedo registri terminologiajn informojn. Tiun laboron oni faras sur niveloj unulingva, dulingva, plurlingva kaj multlingva. Celo- kaj apliko-stirataj principoj determinas la konceptadon de teknikaj terminaroj, glosaroj kaj aliaj terminografiaĵoj pripensitaj por diversaj celpublikoj (ekz. en edukado, en la medio de amaskomunikiloj k.t.p.). Rilate “signifon” kaj terminografion, la plej gravaj konsideroj inkluzivas:

- Nociojn kaj nociojn strukturojn: nocioj estas mensaj konstruaĵoj (kogneroj). Kadre de kampo-specifaj scioj, nocioj strukturoj formas la bazon por iu ajn terminaro. El lingvistika vidpunkto, la signifo de iu termino estas la nocio indikita fare de tiu termino. En iu ajn faka agado kaj en ĉiuj specoj de profesia komunikado, nocioj formiĝas kaj konstante ŝanĝiĝas. Kreadon de nocioj stiras ankaŭ kulturaj konvencioj kaj lingvo estas la ĉefa evidentaĵo de kulturo. La kompleksa kaj vigla interagado inter la kreado de terminoj kaj la kreado de nocioj atentendas en ĉiu fazo de la terminologia evoluo/evoluiĝo kaj de la terminografio.
- Difinojn, kuntekstojn, ekzemplojn: kvankam oni distingas inter diversspecaj difinoj (ekz. enhava, perampleksa, operacia k.t.p.) kadre de sistema terminologia laboro, nocio-sistemon respegulas difinoj interligitaj. Plurdimensiaj nocio-sistemoj

postulas difinojn, kiuj bildigas la diversajn aspektojn aŭ distingebligajn kriteriojn. Pro tio necesas formuli principojn por la skribado kaj/aŭ la taksado/reviziado de difinoj (vidu la normon ISO 704 kaj la libron de Wright/Budin el la jaro 1997: “*Dos and Don'ts of definition writing*”).

- Kuntekstojn (inkluzive de kunteksto difinaj kaj ilustraj): kadre de terminologia administrado, kunteksto bildigas la funkcion de termino en interkomunikado, t.e. ili estas teksteroj. La dokumentado de diversaj funkcioj de kunteksto estas utila kaj tiam, kiam mankas tempo por verki perampleksajn difinojn, la dokumentado de kunteksto ofertas utilan alternativon, aparte se oni uzas tekstaran analizadon por rapidege krei tekstaregojn. Kunteksto apogas difinojn kaj iuokaze povas esti la solaj haveblaj informoj (manke de difinoj). Ili valoras eĉ malmanke de difinoj, ĉar ili elmontras, ke la difino estas la ĝusta en iu okazo. Ĉiukaze, oni povas konsideri, ke ili estas aŭtentika fonto, per kiu eblas analizi la uzon de terminoj kiel ankaŭ de ĉi ties kunaperantaj vortoj.

Terminologia laboro kompara kaj terminologia laboro kunlabora konsistas el du bazaj aliroj al la terminologia administrado:

- En terminologia laboro kompara necesas ekzamenado de terminoj kaj nocioj, kiuj uzatas en diversaj lingvoj, por tiel alveni al t.n. “ekvivalentaj” terminoj rekomendotaj en terminologia resurso aŭ normo. Tiu procedo ofte malkovras breĉojn en naciaj strukturoj kaj en uzado de terminoj inter lingvaj komunumoj. Ekzamine de la problema demando de “ekvivalenteco” ene de pragmata (kontraŭe al filozofia) kunteksto, utilas celokonforma aliro. Necesas ekzameni ekvivalentecon tekstan kaj komunikan kontraŭ ekvivalenteco terminologia aŭ leksikologia. Je ĉi tiu stadio, terminologia analizo kompara postulas ĝisfundan dokumentadon de tiucela esplorado kaj de komitataj diskutoj rilate al ĉiuj koncernaj lingvoj, por tiel konstrui unikan bazon de scioj kaj sistemon por subteni decidojn.
- En terminologia laboro kunlabora, oni atingas la plej bonajn rezultojn (aparte por lingva evoluigado kaj terminologia normigado) se lingvistoj, terminologiistoj kaj kampo-spertuloj kunlaboradas kadre de komitatoj. Kutime, ĉi tiuj diversaj spertuloj posedas malsamajn sciojn kaj spertojn, per kiuj ili povas kontribui al kompleksa tasko. Tiuj celoj estas:
 - kampo-specifaj scioj (naciaj scioj)
 - lingvaj scioj (ĝeneralaj kaj lingvo-specifaj scioj)
 - terminologiaj scioj (scioj pri labormetodoj, kiuj transpontas la breĉon inter la du supraj specoj de scioj)

3 Ellaborado kaj efektiviĝado de terminologia politiko

La metodaro skizita en ĉi tiuj gvidlinioj emfazas la bezonon sisteme koncepti, ellabori, efektiviĝi, funkciigi, diskonigi kaj subteni terminologian politikon kun klaraj celoj kaj perspektivoj, kaj kun terenoj kaj celoj por aplikado. Ĉi-lige oni devas atente konsideri la uzadon de informretoj subtene al tia terminologia politiko, aldone al la fakto, ke informretoj iĝas pli efikaj, se ilin subtenas terminologia politiko. La starigo de organizaj kaj teknikaj infrastrukturoj lige kun terminologia politiko estas esenca rimedo por atingi ĉi ties celojn kaj perspektivojn lige kun (konkretaj, ĝeneralaj aŭ specifaj) terenoj kaj celoj por aplikado.

3.1 Ellaborado de terminologia politiko

Dum oni koncentriĝas pri terminologia evoluigado, la ellaborado de terminologia politiko povas esti direktita ĉefe al la evoluigado de:

- la pria ĝenerala lingvo kiel rimedo por kampo-specifa komunikado ĝenerale
- la faklingvoj de iuj fakoj en iu lingvo aŭ
- kombinaĵo de ĉi tiuj du aspektoj

Ĉi tiun aliron, tamen, povas forte influi la lingva medio, en kiu ĝi aplikendas. Troviĝas amasego da diversaj situacioj, kiuj eventuale estos prikalkulendaj dum ellaborado de terminologiaj politikoj laŭ ĉi tiuj gvidlinioj.

Ene de unu lingva komunumo, unuflanke terminologia evoluigado povas esti necesa por certaj faklingvoj kaj aliflanke pluraj ekzistantaj kaj, do, konkuraj aroj da terminoj en aliaj faklingvoj povas bezoni harmoniigon. Iuj lingvaj komunumoj estas geografie izolitaj ene de lando. Ili eventuale kunestas kun aliaj lingvaj komunumoj aŭ estas pli-malpli sendependaj lingvaj minoritatoj. Aliaj komunumoj transpaŝas limojn de du aŭ pli da landoj (eble kun diversaj statusoj en diversaj regionoj) aŭ situas dise tra multaj landoj. En iuj okazoj, minoritata lingvo ekzistas en unu aŭ pli da landoj kaj estas forizolita disde la evoluo de sia plejmulta lingvo en la devenolando. En tiaj okazoj, komunumoj de minoritata lingvo foje ĝuas aŭtonoman aŭ duonaŭtonoman statuson ene de sia gastigolando kaj, pro tio, evoluas terminologiaj apartaĵoj por akomodiĝi al kaj pace kunestadi kun la komunumo de la plejmulta lingvo aŭ komunumoj ĉirkaŭe. En aliaj okazoj, tiaj minoritatoj pli aŭ malpli dependas de la lingva evoluo/evoluigo en sia devenolando.

La jenaj gvidlinioj celas legantojn kun diversaj lingvaj fonoj, kuntekste de grandaj landoj, kiuj provas starigi landan terminologian politikon, de mezgrandaj aŭ malgrandaj landoj havantaj unu aŭ pli da lingvaj komunumoj kaj inkluzive de plej etaj lingvaj komunumoj kaj alispecaj komunumoj, kiuj bezonas terminologian politikon. Ĉiu lingva komunumo eventuale havas diversajn bezonojn rilate starigon de institucioj kaj homan kapabligon, kiuj estas eroj en la konceptado, ellaborado kaj efektiviĝado de terminologia politiko laŭ la apartaj kulturo, socio kaj aliaj cirkonstancoj koncernataj.

3.2 Efektivigado de terminologia politiko

Decidfarantoj nun alfrontas la eksterordinaran defion por elpensi novajn manierojn kaj rimedojn cele al perprovizado kaj ekspluatado de informrimedoj en siaj planoj por evoluigado. Ĉi-rilate, plej ofte oni devus elpensi terminologian politikon subtene de, aŭ eĉ kadre de aliaj landaj politikoj, kiel ekzemple politikoj informada, edukada, kapabligada, instituci-starigada, teknologio-rilata, novigado-rilata k.t.p.

Terminologia politiko efikas sur praktike la tutan profesian vivon, la edukadon, la trejnadon, la sansistemon k.t.p., tiel tuŝante ĉiun, ĉu junan ĉu maljunan, kiu bezonas kompreni aŭ akiri iajn ajn specifajn sciojn. En plejmulto de la okazoj estas saĝe certigi la aktivan kunagadon de tiuj institucioj, kiuj jam plej decide dediĉas sin al lingvoplanadaj politikoj. Laste (sed ne mapli grave), estas konsilinde engaĝi ankaŭ la tutan lingvan komunumon en la procedon.

Ĉi tiuj gvidlinioj grandparte sekvas la modelon skizitan en la Unesko-eldonaĵo PGI-90/WS/11¹³, kiu celas efektivigadon de landaj informadaj politikoj.

Tamen, ĉar la gvidlinioj ofte uziĝos sur regiona aŭ loka nivelo por unu aŭ kelkaj lingvaj komunumoj, oni devis simpligi la modelon. Se la apliko estas grandskala, sur landa nivelo kaj por pluraj lingvaj komunumoj, uzindas la supre menciita eldonaĵo kombine kun ĉi tiuj gvidlinioj.

3.3 Homa kapabligo

En iu ajn terminologia politiko, starigo de institucioj kaj homa kapabligo estas gravaj eroj. Jam en fruaj fazoj de programoj por terminologia planado povas aperi bezono de terminologiaj infrastrukturoj. Speciale tiam, oni bezonas terminologiistojn kaj aparte spertulojn pri terminologia politiko por eviti iujn el la obstakloj, kiuj aperas dum la efektivigado de terminologia politiko. Oni devus starigi sisteman agoplanon por plifortigi homan kapabligon. Tiu plano faciligu la trejnadon de spertuloj pri terminologio, bezonataj por trakti ĉiujn aspektojn de ellaborita terminologia politiko kaj por plenumi iujn aliajn agadojn rilate al terminologio, identigitajn kiel ĉi-rilate neprajn.

La kvanto da terminoj en ĉiu fako aŭ kampo plimultiĝas kongrue kun ĉiuj novaj inventaĵoj. La priaj informoj dissendiĝas kaj scioj akiriĝas pere de terminologio (terminoj, terminologiaj produktoj...). Fakularoj kaj spertuloj tra la tuta lingva komunumo devus subteni la provizon de konvenaj terminoj sciencaj, teknikaj, edukadaj kaj ekonomiaj. En malgrandaj landoj aŭ lingvaj komunumoj kun evoluantaj aroj da terminoj, oni devus, dum la unua fazo de efektivigado de terminologia politiko, prioritare prepari bazajn terminojn, kiuj plej urĝe bezonatas. Tiuj terminoj eventuale estas terminoj bezonataj por la edukada sistemo, aŭ eble por la higieno aŭ publika sano, publika transporto k.t.p. Do eventuale necesas decidi pri prioritata(j) kampo(j), sur kiu(j) oni unue apliku la terminologian politikon.

¹³ De MONTVILOFF, vidu la bibliografion.

Teknikaj tradukistoj ofte ludas decidan rolon en la kreado de terminoj, ĉar ili por siaj tradukoj ofte proponas novajn terminojn en la cellingvo surbaze de novaj terminoj aperintaj en la fontlingvoj. En ĉiuj kazoj, la kreado kaj la alprenado de terminoj postulas proksiman kunlaboradon inter terminologiistoj, fakuloj, lingvistoj, tradukistoj kaj instruistoj. Oni povas kunordigi agadojn por eviti elekton de konfliktantaj terminoj. La uzado de minoritataj, flankenigitaj kaj evoluantaj lingvoj ene de iu lando provizas onin per rimedo por aprezi indiĝenajn teknologiojn kaj ilin integri en modernan teknologion. Sekve, la subteno de lingva evoluigado stimulas ankaŭ la konservadon de kultura heredaĵo kaj kultura diverseco de tiu lando.

Se planoj inkluzivas starigon de terminologiaj institucioj, povas esti bezono trejni dungitojn, kiuj specialiĝas pri administrado de terminologiaj projektoj, terminologia laboro kaj terminografio. Unuflanke, terminografiistoj – kiuj kapablas eltiri terminojn, dokumenti ilin laŭ specifaj terminografiaj principoj kaj kompili malnetajn listojn de terminoj – eventuale bezonas proksiman kunlaboradon kun kampo-specifaj fakuloj. Aliflanke, terminologiistoj devas esplori la principojn kaj praktikojn rilate sekundaran kreadon de terminoj (t.e. kiam *nova* termino estas kreata por indiki nocion, kiu jam havas terminon en tiu lingvo aŭ en alia lingvo). Kompreneble ĉiuj spertuloj pri terminologio devus posedi ĝisfundajn sciojn pri principoj ortografiaj, skribmanieraj kaj vorto-kreadaj de la koncerna(j) lingvo(j).

Oni ĉi-rilate ne subtaksu kontribuojn el la privata sektoro. Spertuloj konscias, ke ili devas komuniki kun kampo-specifaj fakuloj kaj kun laikoj. Tamen, unuavice, oni devas komuniki en sia propra kampo per neambiguaj aroj da terminoj. Kampo-specifaj fakuloj foje povas decidi komenci terminologiajn projektojn kaj kompiladon de teknikaj terminaroj en siaj diversaj fakoj. Ofte ĉi tiaj personoj estas nek terminologiistoj nek terminografiistoj kaj sekve bezonas helpon por la kreado de terminoj, ties sistema dokumentado kaj laste por la kompilado de terminologia datumaro en siaj respektivaj fakoj.

3.4 Rolo de landaj terminologiaj institucioj

La rolo de institucioj, kiuj ofertas terminologiajn servojn, estas konsili kaj subteni la registaron en la konceptado, ellaborado, efektivigado kaj funkciigado de strategioj pri terminologio kaj terminologia evoluigado. Okazas, ke iu terminologia institucio provizas unu aŭ pliajn landojn per tiaj servoj. Okazas ankaŭ ke diversaj institucioj sur landa kaj regiona niveloj prizorgas plurajn terminologiajn servojn, kiujn ili liveras kiel parton de sia primara misio. Foje ankaŭ kampo-specifaj institucioj ofertas terminologiajn servojn.

Terminologiaj institucioj konsilas pri la terminologia politiko kaj aliaj aferoj rilate terminologion kaj faklingvojn. Ili kapablas starigi kaj taksi normojn por terminografiaj celoj, cele al kreado de instalaĵoj/rimedo kaj al efektivigado de normigitaj proceduroj por kolekti, dokumenti, sistemigi, normigi kaj dissemi terminologiajn informojn por la diversaj lingvaj komunumoj tra la lando. Terminologiaj institucioj povas oferti ankaŭ informservon pri konvencioj rilate faklingvojn samkiel pri terminografiaj demandoj. Plie, ili povus kunordigi, subteni kaj faciligi projektojn por la evoluigado de faklingvoj per disponigado de terminologiaj instalaĵoj kaj de terminologiaj produktoj al rilataj

informado- kaj komunikado-celaj sistemoj, ekz. per evoluigado kaj administrado de terminologia datumbazo. En la nuna epoko de interrilatantaj retejaroj, tiuj datumbazoj povus esti en formo de “virtuale centra” terminologia datumbazo, kiu fakte konsistas el retaro de disaj datumbazoj.

La celo de landaj terminologiaj institucioj povas esti la subteno de fortigo de memstareco ĉe ĉiuj civitanoj per terminologiaj kontribuoj, kiuj fluigas komunikadon sur diversaj niveloj en diversaj fakoj kaj agadokampoj. Aliaj celoj povas esti la liverado de konvenaj multlingvaj terminologiaj produktoj en diversaj fakoj kaj kampoj, la kunordigado de la produktado de terminaroj kaj eksteraj terminologiaj kontribuoj, la forĝado de partneraroj kun kunlaborantoj kaj koncernatoj, la administrado de landa terminologia datumbazo kaj eble la dissemado de terminologiaj informoj al uzantoj, klientoj kaj kunlaborantoj per listoj de terminoj, teknikaj terminaroj kaj elektronikaj amaskomunikiloj. Landaj terminologiaj institucioj ne nur faciligas komunikadon sciencan, ekonomian kaj teknikan, sed ankaŭ povas ludi gravan rolon en sciotransigo, kaj sekve akceli ĝeneralan memstarecon ĉe ĉiuj civitanoj de la lando, pligrandigante ĉi ties kapablojn sciencan, ekonomian, teknikan, kiel ankaŭ ĝenerallingvan.

Povas okazi, ke iu landa terminologia institucio bezonas iĝi kunordigejo de terminologia laboro, ĉar la mendado por terminologio kreskas ĉiutage. En tia okazo, gravas ke oni efike kaj ade kunordigu kaj administru la laborfluan rilate la dokumentadon de terminoj, cele al evito de duoblaĵoj kaj fine al antaŭeniĝo de normigado. Landa institucio por terminologio povas agi kiel la landa prizorgejo, kiu registras la terminologiajn kontribuojn el diversaj komunumoj lingvaj kaj fakaj en datumbazo centra aŭ disa. Terminologiaj informoj tiel akireblas tra centra pordejo. En tiu maniero la landa institucio por terminologio povas provizi la tutan komunumon per gravaj servoj.

En landoj, kie ekzistas unu aŭ pli da lingvaj komunumoj dise sur larĝaj teritorioj, terminologia infrastrukturo *necentra* povas esti la plej bona solvo de la problemoj ligitaj kun la efektivigado de terminologia politiko. Terminologiaj oficejoj *necentra* povas servi kiel resursoj por landa terminologia institucio (oni ekz. povas provizi la uzantojn per unueca, facile uzebla aliro al la centraj portaloj de multaj terminologiaj organizaĵoj). Tiuj oficejoj povas trovi tie, kie la specifaj kampoj forte rolas aŭ en la geografia/lingva regiono, kie koncentriĝas la plejmulto de la denaskuloj de lingvo bezonanta terminologian evoluigon. Terminologiaj projektoj povas esti iniciatoj ankaŭ de unuopuloj aŭ de fakspecifaj organizaĵoj/asocioj, kiuj konstatas bezonon de terminologia evoluigado sur specifa kampo. Rezulte la propraj lingvaĵoj de tiuj koncernatoj povus iĝi pli funkcipovaj en la specifa regiono aŭ kampo.

3.5 Privataj iniciatoj

Terminoj estas strategiaj resursoj en lando plur- aŭ multlingva. Ili estas vehikloj, kiuj dissemas sciojn kaj informojn. Se oni uzas ĝustajn, unuecajn aŭ normigitajn arojn da terminoj, realaj kompetentecoj evoluas en komunikado scienca kaj teknika. Aldone oni bezonas, en la t.n. terminologia merkato, novajn kompetentecojn kaj novajn specojn de profesiuloj, kiuj provizas per produktoj kaj servoj al la uzantoj. Tiuj uzantoj povas esti:

- kreantoj de terminoj (t.e. esploristoj, teknikistoj, administristoj k.t.p.)
- produktantoj de terminologiaj datumoj (t.e. normigantoj de terminologiaj resursoj, kreantoj de terminologiaj datumbazoj, fakaj leksikografiistoj k.t.p.)
- distribuantoj de terminologiaj datumoj (t.e. eldonejoj de vortaroj, enretaj informservoj k.t.p.)
- ĝenerale iu ajn civitano

Produktitaj terminologiaj produktoj konsistas ĉefe el:

- diversaj specoj de terminologiaj informoj en diversaj formoj por diversaj celoj kaj diversaj uzantaroj
- terminologiaj iloj diverscelaj

Se oni inkluzivigas terminologian dokumentadon, terminologiaj informoj konsistas el tri apartaj fundamentaj datumotipoj (unu aŭ plur-/multlingvaj), kiel ekzemple:

- verfaktaj terminologiaj datumoj (t.e. ekz. informoj pri kampo-specifaj nocioj kaj ĉi ties indikoj pere de lingvaj kaj nelingvaj simboloj, aldone al diversaj rilataj datumoj)
- bibliografiaj datumoj pri diversaj specoj de eldonaĵoj en la kampo de terminologio
- datumoj prifaktaj rilate instituciojn, spertulojn, programojn, aranĝojn kaj aliajn agadojn en la kampo de terminologio

Ĉiu el tiuj datumotipoj postulas apartan specon de datumbaza sistemo (tio signifas aro de apartaj datumbazoj aŭ datumbaza sistemo, kiu entenas plurajn diversajn datumomodelojn). Terminologia institucio kiel informejo aŭ dokumentadejo devas trakti ĉiujn tipojn de datumbazaj sistemoj, kiuj estas konceptitaj diverscele surbaze de klare difinitaj datumaj kategorioj (laŭ la “inform-objektoj”¹⁴ bezonataj por dokumenti iun ajn datumomodelon). Oni povas uzi tiujn datumojn, kiuj estas produktitaj kaj konservataj en tiaj sistemoj kun la rilataj programaroj, ankaŭ por generi diversajn specojn de “produktoj”, kaj formas bazon por diversaj “servoj”.

Formale, terminologiaj datumoj reprezentas specifajn sciojn sur la nivelo de nocioj. Tiuj datumoj troveblas:

- kiel tradicia eldonaĵo (t.e. vortaro, glosaro, leksikono k.t.p. paperaj)
- kiel elektronika eldonaĵo (kiu inkluzivas aŭ sole datumojn en elektronika formo aŭ kombine kun programaro aŭ aparataro, ekz. kiel elektronika vortaro)
- pere de enretaj informservoj

¹⁴ Tradukista rimarko: inform-objekto estas aro da informoj difinita kiel unuo.

En poŝkomputiloj aŭ en eĉ pli etaj poŝformataj elektronikaj vortaroj, terminologiaj datumoj uzeblas nedisigeble kombine aŭ integre kun la respektiva programaro aŭ eĉ aparataro.

Klientoj de la terminologia merkato povas akiri terminologiajn datumojn aŭ por sola interna uzado aŭ por reuzado, dum sia interŝanĝado de terminologiaj datumoj k.t.p. Tamen, la grado de komplekseco kaj de detalo¹⁵, kiujn bezonas terminologiaj datumoj, dependas de la diversaj uzantaroj. Sekve, estas tre ŝpare prepari terminologiajn datumojn multcelajn, kiuj taŭgas por diversaj aplikoj kaj uzantoj. Tiukadre, konvene fasonitaj kliento-specifaj fasadoj ebligas plenumi la bezonojn de la uzantoj. Terminologiajn datumojn oni povas efikege uzi ankaŭ kiel kernajn informojn, ĉirkaŭ kiuj oni povas organizi la datumaron de kampo-specifaj enciklopedioj.

La plej kutima speco de ilo por trakti terminologiajn datumojn diversmaniere estas komputilaj programaroj, kiuj aplikas terminologion. Troviĝas diversaj specoj de **sistemoj por terminologia administrado**, kiuj estas konceptitaj kiel iloj destinitaj por registri, stoki, trakti kaj eligi terminologiajn datumojn en profesia maniero por diversaj celoj. **Terminologiaj datumbazoj** konsistas el iuj terminologiaj datumoj kaj el iu sistemo por terminologia administrado por trakti ĉi tiujn datumojn. Grandaj terminologiaj datumbazoj foje estas integritaj en pli aŭ malpli rafinita organiza aŭ institucia strukturo starigita por kolekti kaj prizorgi kvantegojn da terminologiaj datumoj por multegaj uzantoj. Nuntempe la plejmulto de la sistemoj por terminologia administrado en personaj komputiloj estas aplikataj fare de unuopaj uzantoj, de malgrandaj kooperaj societoj (ĉu ligitaj ĉu ne ligitaj per konvena loka reto) aŭ de grandaj departementoj (en kiuj la unuopaj laborlokoj kutime estas ligitaj per pli-malpli rafinita loka reto aŭ interna reto).

Oni daŭre pli evoluigas sistemojn por terminologia administrado en ilojn por diversaj aplikoj, kiel ekzemple

- komputile helpata tradukado
- scienca kaj teknika verkado (inkluzive de teknika dokumentado)
- administrado de anstataŭado-celaj pecoj¹⁶
- elektronika komerco

Aliflanke, oni efektivas modulojn de sistemoj por terminologia administrado – karakterizitajn de diversaj gradoj de rafiniteco – en ĉiaj aplikaj programaroj. Tiuj moduloj estas daŭre pli aplikataj en diversaj informado- kaj komunikado-celaj laborfluoj kaj tiel troviĝas por ili novaj merkatoj en:

- kunlabora teknika verkado (fare de teknikaj redaktistoj)

¹⁵ Tradukista rimarko: la grado de detalo ligiĝas kun la t.n. principo de “grajneco”, laŭ kiu ĉiu datuma kategorio devas esti kiom eble plej preciza.

¹⁶ Tradukista rimarko: anstataŭado-cela peco estas ekzemple peco uzata por anstataŭigi difektitan pecon en iu maŝino.

- dokumentado (en la senco de informado kaj dokumentado, inkluzive de arkivado kaj klasifikado)
- terminologia laboro kunlabora

Terminologia laboro kunlabora, komputile helpata (kaj perrete distribuata), rapidigas kaj pliefikigas la preparadon, traktadon kaj prizorgadon de terminologiaj datumoj, kaj faras tion konforme kun la modernaj postuloj rilate kontrolon de kvalito.

La sekvaj terminologiaj servoj jam ekzistas:

- servoj de terminologia konsilado kaj de terminologia trejnado
- alilokigo de terminologiaj taskoj
- informservoj en la kampo de terminologio

Servoj de terminologia konsilado kaj de terminologia trejnado estas plej ofte bezonataj lige kun aspektoj de aplikado, kiel:

- aplikado de terminologiaj principoj kaj metodoj (kiu inkluzivas aparte konvenan aplikadon de ekzistantaj normoj pri terminologiaj principoj kaj metodoj kiel ankaŭ de rilataj normoj)
- elektado kaj aplikado de iloj (ekz. programaroj por trakti multlingvajn datumojn)
- administrado de terminologiaj projektoj k.t.p.

Ofte okazas nuntempe, ke fakspertuloj ne studis la bazan teorion pri logiko kaj epistemologio sur kiu baziĝas la priscienca filozofio kaj informadiko. Sekve ili bezonas trejnadon pri la teoriaj kaj metodaraj fundamentoj de la terminologio kiel scienco kaj de la terminografio. Grandaj organizaĵoj kaj institucioj ofte bezonas integri terminologiajn metodojn kaj ilojn en siajn planojn rilate administradon de informoj aŭ kontrolon de kvalito. En multaj landoj, registaraj instancoj kaj aliaj publikaj aŭtoritatoj deziras efektivigadon de politikoj cele al sciotransigo, kiuj grandparte profitu el konvenaj metodoj por terminologia planado. Institucioj kaj organizaĵoj ofte bezonas ankaŭ konsilojn pri juraj problemoj (aparte rilate al rajtoj pri intelektaj propraĵoj) ligitaj kun la aplikado de terminologiaj datumoj kaj iloj.

Daŭre pli ofte, institucioj kaj organizaĵoj ĉiuspecaj opinias ke alilokigo estas konvena metodo, per kiu oni povas elturniĝi se oni havas difinitajn, limigitajn terminologiajn bezonojn. Alilokigo povas temi, ekzemple, pri:

- esplorado kaj evoluigado laŭpete pri novaj iloj aŭ aplikoj
- adaptado de ekzistantaj iloj k.t.p., kiel
 - konceptado kaj efektivigado de sistemoj por terminologia administrado aŭ eĉ de terminologiaj datumbazoj

- superrigarda foliumilo (t.n. “meta-foliumilo”) por informretoj, k.t.p.
- terminologia laboro laŭpete rilate al
 - preparado de terminaroj
 - terminologia prizorgado (inkluzive de i.a. reviziado kaj ĝisdatigado)
 - aliformigado aŭ kunigado de terminologiaj datumoj
 - taksado kaj validigado de terminologiaj datumoj
- servoj de prizorgado kaj bontenado rilate al
 - prizorgado de la programaraj sistemoj por terminologia administrado kaj de ties novelddonoj
 - ĉiokovra prizorgado de datumaroj, k.t.p.

Pli kaj pli ofte (simile al la ĝenerala situacio en la kampo de informado- kaj komunikado-celaj teknologioj), terminologiaj produktoj kaj servoj haveblas kiel – aŭ ligitaj kun – unu el la multaj specoj de informservoj haveblaj en la merkato. Krome, ili daŭre pli ofte estos integritaj en aliajn aplikaĵojn de informado- kaj komunikado-celaj teknologioj.

Por dissendado de terminologiaj datumoj al diversaj uzantaroj kun diversaj uzanto-bezonoj, oni ne devus elbari klopodojn starigi komercajn kaj porpagajn informretojn por oferti:

- verfaktajn terminologiajn datumojn
- (aldone) terminologiajn produktojn kaj terminologiajn servojn kun aldonvaloro

Tiel, klientoj devas pagi por terminologiaj produktoj kaj terminologiaj servoj. Tamen, ju pli da klientoj povas elekti inter daŭre pli diverseca aro da terminologiaj produktoj kaj servoj, des pli tiuj servoj iĝas relative pageblaj.

La landa terminologia infrastrukturo – ĉu centra ĉu necentra – devas do plene kunlabori kun la privata industrio kaj ĝin provizi per helpado aŭ trejnado terminologia kaj terminografia (vidu punkton 3.1). Landonivelaj spertuloj povas helpi ankaŭ en la redaktado kaj finpreparado de la finaj produktoj kaj en la publikigado kaj surmerkatingado de produktoj. Ju pli oni dekomence konceptas terminologian politikon kiel multlingvan kaj neekskluzivan, des pli grandiĝas la potencialaj merkatoj.

La planado kaj efektivigado de landa terminologia politiko povas esti plenumita de publikaj institucioj aŭ delegitaj organizaĵoj el la privata sektoro (aŭ komercaj firmaoj pri konsilado aŭ neprofitcelaj NRO-oj).

4 Preparado, ellaborado kaj efektivigado de terminologiaj politikoj

La jenaj gvidlinioj antaŭenigas la ellaboradon kaj efektivigadon de politiko unike terminologia. Tiaj terminologiaj politikoj troviĝas, ekzemple, en pluraj landoj kiel ero de informadaj politikoj aŭ en politikoj, kiuj proksime rilatas al registaraj aŭ neregistaraj inform-agadoj. Publikaj kaj privataj institucioj kutime ellaboras multajn regulojn, interkonsentojn kaj gvidliniojn – kiujn ili bezonas por plenumi siajn specifajn ekonomiajn, sociajn aŭ politikajn celojn – por kolektado kaj protektado de informoj. Multaj el tiuj reguloj, interkonsentoj kaj gvidlinioj estas jam sukcese efektivigitaj kaj nun akceptitaj kiel kriterioj por la funkciado kaj evoluigado de specifaj agadoj. Tamen, foje ilia diseco kreas ĥaosan situacion. Krome, plej ofte ili neglektas la fundamentan rolon de la terminologio. Pro la rapida evoluo kaj kunfandiĝo de informado- kaj komunikado-celaj teknologioj, demandoj iĝas eĉ pli kompleksaj. Dum ĉi tiuj gvidlinioj koncentriĝas pri terminologiaj politikoj, oni neglektu nek ĉi ties integradon en aliajn politikojn nek ĉi ties kunordigadon kun tiuj ĉi.

Surbaze de spertoj el ellaborado de landaj politikoj rilate informadon kaj sciojn kaj laŭ ĉi tiuj gvidlinioj, la evoluadofazoj por terminologia politiko konsistas el:

- FAZO 1: Preparado por la terminologia politiko
- FAZO 2: Ellaborado de la terminologia politiko
- FAZO 3: Efektivigado de la terminologia politiko
- FAZO 4: Subtenata funkciigado de la terminologia infrastrukturo kaj de la adapta mekanismo por la terminologia politiko

La jena aranĝo koncentriĝas pri terminologio sur la nivelo de lando aŭ de lingva komunumo, sed oni povas facile adapti ĝin al aliaj niveloj aŭ organizaj medioj.

Ekde FAZO 1 ĝis FAZO 3, pliiĝas la graveco de strikta kontrolado kaj de obeigataj tempoplanoj por projektaj livereblaĵoj. Krome, la nivelo de publika kontrolado eble pliiĝas survoje al la fazo de efektivigado de la terminologia politiko. Depende de ĉi ties amplekso, la fazoj kaj taskoj ĉi-poste skizitaj estas ankoraŭ pli detale apartigeblaj. Estas speciale grave noti, ke tiuj fazoj kaj taskoj plej verŝajne ne okazas sinsekve, sed parte koincidas kaj foje okazas eĉ paralele. Nepras do – por sukcesigi la programon – zorgoplena projektoplanado, kiu ebligas al projekto-administrantoj regi klare esprimitajn taskerojn, livereblaĵojn kaj limdatojn por gravaj projekteroj. Projekto-administrataj programaroj, adaptitaj por la efektivigado de terminologia politiko, povas multe helpi en la planado kaj kontrolado de kompleksaj procezoj.

En iu ajn punkto de la laboro rilate la terminologian politikon, la studado de jam ekzistantaj ekzemploj kaj spertoj el aliaj lokoj tra la mondo povas ege utili (grave ankaŭ por eviti iujn obstaklojn, kiujn jam frontis aliuloj).

4.1 FAZO 1: Preparado por la terminologia politiko

Ĉar la ellaborado kaj la efektivigado de terminologia politiko estas ege kompleksa afero, oni devus bazi la procezon sur ĝisfunda preparado. La fazo de preparado povas inkluzivi:

- taksadon de lingva kaj terminologia medio kaj de ekzistantaj leĝoj
- agadojn cele al kreado de lingvokoscio kaj klopodojn cele al akiro de oficiala agnosko por ĉi tiuj agadoj
- rekomendadon de metodaro kaj de haveblaj aŭ imageblaj proceduroj
- kunmetadon de preparaj dokumentoj
- organizadon de landa proceduro por konsultado

4.1.1 Taksado pri la lingva kaj terminologia medio

Necesas ĉionkovra taksado unue pri la plej ĝisdata faklingva evoluo ĉe la lingva komunumo kaj ĉe ekzistantaj kaj eventualaj fakaj komunumoj, due pri la efiko de faklingvoj sur politikojn kaj strategiojn aŭ ilia interagado kun ĉi tiuj kaj trie, sed ne malpli grave, pri la sintenoj de la lingva komunumo ĝenerale pri la lingvo kaj la terminologio. Tiu taksado determinu la ĉefajn koncernatojn kaj iajn ajn sociajn aŭ psikologiajn barojn kontraŭ terminologia politiko. Oni devas identigi aliajn aspektojn, ĉu palpeblajn aŭ ne, kaj venki ankaŭ aliajn problemojn. La taksado devus inkluzivi ankaŭ analizon de rektaj kaj nerektaj avantaĝoj kaj de la taksataj, supozataj kostoj por la ellaborado kaj la efektivigado de la terminologia politiko. Krome, oni devas klare skizi la celojn kaj amplekson de la terminologia politiko (samkiel elekto-eblojn por ties realigado), tiel ke la situacio plene takseblu kaj validaj konkludoj eltireblu. Tiu procedo povus formiĝi kiel kazostudo aŭ almenaŭ enhavi kazostudon.

Ĉi tiu komenca fazo de preparado devus enteni superrigardon pri la reglamento aŭ strategia kadro rilate informadon (konstitucia juro, jurisprudenco, laŭleĝaj kontroloj, validaj leĝoj, landaj gvidlinioj, dekretoj k.t.p.). Eventuale estas utile montri iajn interkovrantajn nekonsekvencaĵojn kaj kontraŭdirojn en aktualaj leĝaj regularoj kaj juraj politikoj.

La informoj tiel kolektitaj servas por tri ĉefceloj:

- emfazado de la bezono de landa terminologia politiko
- taksado de la amplekso, ĝis kiu profesiuloj kaj ĝenerale uzantoj jam agnoskas ĉi tiun bezonon
- eltrovado de breĉoj kaj neadekvataĵoj en ekzistantaj politikoj

Bazaj dokumentoj devus enhavi

- enkondukon en la fizikan, socian, ekonomian kaj administran mediojn
- takson pri la ĉefaj landaj celoj (kiu konsistu ankaŭ el la politikaj kaj sektoro-specifaj prioritatoj en la landa plano por evoluigo)
- takson pri la socio-ekonomia situacio de la koncernaj lingvaj komunumoj
- takson pri la landaj resursoj terminologiaj kaj lingvaj, kiu inkluzivu analizon pri la statuso de terminologiaĵoj en ĉiu lingvo
- takson pri la ĉefaj institucioj terminologiaj kaj lingvaj, ĉi ties rimedoj kaj servoj
- takson pri la landaj uzantoj, t.e. la ĉefaj specoj de uzantoj instituciaj kaj individuaj kaj ĉi ties bezonoj (ankaŭ terminologiaj)
- takson pri la aktuala lingvopolitika situacio, t.e. la amplekso de tiu politiko, la mekanismoj por ĉi ties ellaborado kaj efektivigado kaj ĉi ties mankoj
- resuman konkludon, kiu konstatas la bezonon de terminologia politiko kaj skizas la nivelon de agnosko kaj la ĉefajn limigojn rilate kun ĉi ties efektivigado

La laboron dum la fazo de preparado verŝajne plenumu ĉefe kampo-spertuloj, kiuj estas organizitaj en komitato aŭ en pluraj laborgrupoj kunordigitaj fare de gvida persono, de grupo aŭ de institucio. Por certigi klaran komprenon flanke de ĉiuj koncernatoj kaj decidfarantoj, oni aparte zorgu, ke la ideoj estu ellaboritaj kaj rezultoj prezentitaj en konciza kaj facile komprenebla maniero.

4.1.2 Agadoj por pliiigi la konscion kaj klopodoj por akiri agnoskon

Kiel jam supre menciite, oni devus jam komence de la procedo de preparado, ellaborado kaj efektivigado de terminologia politiko akiri oficialan subtenadon aŭ almenaŭ oficialan kuraĝigon. Ĉi tiu kriterio ofte postulas – antaŭ ol oficiala mandato aŭ agnosko estas donita kaj prepare al efektivigado de terminologia politiko – agadojn por altigi la konscion. La karaktero de la kampanjo por altigi la konscion povas ŝanĝiĝi. Dum ĉi tiu komenca stadio estas rekomendate, ke oni inkluzivigu administrantojn, decidfarantojn, leĝofarantojn, fakspertulojn kaj ankaŭ elstarajn personojn en la socio kaj la amaskomunikado. Por starigi firman fundamenton por la estonta laboro, povas esti decida aktiva subtenado fare de ŝlosilaj homoj, kiuj komprenas la celojn de la projekto.

La klopodoj devas iugrade jam inkluzivi identigadon de eventuale ekzistantaj dokumentoj (ekz. studoj, esploroj aŭ ekzamenoj), arigadon de eksterlandaj ekzemploj kaj spertoj, kaj eltrovadon de breĉoj, kiuj plenigendas antaŭ la preparado por la taksado pri la loka medio lingva kaj terminologia.

4.1.3 Rekomendado de metodaro kaj de proceduroj

Fininte la analizojn kaj taksadojn, kaj determininte la celojn kaj amplekson de la programo, oni preparu detalan skizon, kiu indiku la plej konvenan metodaron aplikotan kaj la procedurojn sekvotajn. Ĉi tiuj metodoj kaj proceduroj povas amplekse malsami inter lingvaj komunumoj unuflanke, kaj kampo-spertuloj kaj uzokomunumoj aliflanke. Oni konsideru ilin ankaŭ el la perspektivo de ekzistantaj aŭ bezonataj rimedoj kaj kapabloj. Dum tiu procedo, alte valoras referencado al ekzemploj de principoj kaj spertoj el eksterlando. Oni tamen zorge atentu la subtilaĵojn de la loka medio.

La ĉi-stadie ellaboritaj rekomendoj estu koncizaj kaj klare celitaj por faciligi la decidan procezon en la posta fazo.

4.1.4 Kunmetado de preparaj dokumentoj

La kunmetado de preparaj dokumentoj servas por du ĉefceloj, nome por:

- firmigo de la rezultoj el la ekzamenado kaj la taksado, post komparado kun la ekzistantaj rimedoj kaj kapabloj
- provizo per fundamenta bazo por konstrua publika konsultado en la skalo de lando (aŭ de lingva komunumo) pri la demandoj, kiuj rilatas al terminologia politiko

Cele al determinado de la problemhavaj aspektoj, kiuj plej verŝajne influus landan politikon lingvan kaj terminologian, oni kompilu la rezultojn el la taksado pri la aktuala situacio, kiel notite sub 4.4.1, en unu aŭ pli da koncizaj bazaj dokumentoj, kiuj montras kaj analizas la ĝistiamajn eltrovaĵojn. Oni povas landonivele prezenti tiun direktitan analizon kaj la bazajn dokumentojn supremenciitajn por publika konsiderado. Tiuj dokumentoj tiel estas la ĉefaj labordokumentoj por konsultado sur tiu nivelo. Kelkaj landoj eventuale preferas kombini kaj la baza(j)n dokumento(j)n kaj la analizon en unuopan dokumenton, sed tia farmaniero ne signifas efikas sur la konsultadon.

Rilate la enpaĝigon kaj prezentadon de ĉi tiuj dokumentoj, oni aparte zorgu pri produktado de klaraj kaj simplaj ellaboraĵoj kaj prezentaĵoj tiel, ke nespertuloj (administrantoj, decidfarantoj, leĝofarantoj kaj, ne malpli grave, la publiko ĝenerale) povu facile kompreni ilian signifon.

4.1.5 Organizado de proceduro por konsultado de la tuta komunumo

Plejofte, utilegas organizi kaj gvidi elektecan konsultadoprocedon eĉ jam dum la kunmetado de la preparaj dokumentoj. La publika konsultadoprocedo sur la nivelo de lando aŭ de lingva komunumo povus alternative okazi dum posta stadio aŭ ripetiĝi dum iu ajn ĉefetapo de la procedo de ellaborado kaj efektivigado de la terminologia politiko. Tio dependas de la efektiva situacio de la koncerna komunumo. Tiaj konsultadoj povas havi diversajn celojn kaj sekve ankaŭ diversajn formojn, kiel ekzemple:

- kunvenoj

- interparoloj
- enketoj (ekz. per demandaroj)

Oni registru la rezultojn el la konsultado(j), resumu kaj integri ilin en la procezon por la ellaborado de la terminologia politiko kaj ankaŭ en iujn ajn akompanajn agadojn kampanjecajn.

4.2 FAZO 2: Ellaborado de la terminologia politiko

Kiam la agadoj skizitaj sub Fazo 1 estas finplenumitaj, oni povas ekverki malneton pri la landa terminologia politiko laŭ la rezulta mandato. Tiu fazo konsistas el:

- verkado de malneta propono por terminologia politiko
- verkado de malneta plano cele al kunordigado de la terminologia politiko kun aliaj politikoj por strategia planado
- verkado de plano cele al efektivigado de la projekto
- preparado de malneto pri la definitiva politiko (t.e. dokumento kaj efektivigada plano)
- decido pri la definitiva politiko (t.e. pri la dokumento kaj la efektivigada plano)

Landoj ofte limigas la amplekson de siaj terminologiaj politikoj al sciencaj kaj teknikaj informoj, kaj al la respektivaj inform-rimedo(j) kaj -servoj. Lige kun la diskonigado de sciencaj kaj teknikaj informoj kiel komuna rimedo kun grava merkata valoro – kiu kapablas servi la socian, kulturen kaj ekonomian evoluigon de la lando – oni devus laŭgrade konstruadi konscion pri la fakto, ke terminologio estas nemalhavebla ero de sciencaj kaj teknikaj informoj.

4.2.1 Verkado de malneta propono por terminologia politiko

Oni povas atendi, ke la terminologia politiko – evoluigita laŭ ĉi tiu aliro – certigos, ke bezonoj por terminologio de lando aŭ de lingva komunumo kontentiĝos tiel plene kiel permesas malabundaj rimedoj. En la malneta propono por terminologia politiko, oni ellaboru la konkretajn celojn, amplekson, avantaĝojn, ĉefajn koncernatojn kaj la direktojn sekvendajn en la efektivigado de la terminologia politiko tiel, ke la decida procezo fasilu. Ĉi-stadie, povus utili la kreado de taksado-proceduro por la unuopaj eroj de la malneto. Tiu proceduro enplektu multajn homojn, kiuj rilatas al la posta efektivigado, por tiel malkovri eventualajn implikojn ĝis tiam preteratentitajn, aŭ sub- aŭ super-taksitajn.

4.2.2 Kunordigado de terminologia planado kun aliaj politikoj por strategia planado

Rimarkindaj evoluoj lastatempe en la direkto al tutmonda informa kaj sciohava socio atentinde ekevoluigis registarajn sintenojn pri inform-agadoj, urĝante ilin revizii siajn

landajn prioritatojn kaj starigi novajn politikojn. Por decidado kaj planado oni nuntempe bezonas informojn el fontoj propralantaj kaj alilantaj. Tio postulas terminologiaĵojn por sociaj, financaj, sciencaj kaj teknikaj, kaj kulturaj fakoj. Oni do ne rigardu la terminologian politikon kiel izolitan aferon, sed kiel dokumenton kunordigatan helpe de la ĝenerala strategio aŭ politiko por evoluigado kaj/aŭ aliaj strategioj kaj politikoj rilataj al evoluigado. Oni povas atingi tiun celon per deklaro pri integrado de la terminologia politiko, kiu servu plurajn celojn. Tiuj celoj povas esti:

- ligado de la terminologia politiko al la ĝenerala politiko por evoluigado
- lokado de la terminologia politiko rilate al landaj agadoj por evoluigado (tiel pravigante la bezonon de rimedoj kaj kapabloj)
- provizado de registaraj instancoj, de privataj korporacioj, de NRO-j kaj de neprofitcelaj organizaĵoj per gvidado por la administrado kaj planado de resursoj kaj servoj
- konstruado de fundamenta bazo por iu ajn estonta rekonsiderado pri la terminologia politiko laŭ ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj
- ligado de la terminologia politiko al politikoj pri tradukado scienca kaj teknika kaj al rilataj politikoj por la administrado de procedoj de multlingva komunikado
- emfazado de la efiko sur la terminologian politikon fare el aliaj interrilatantaj politikoj

La proponon pri la terminologia politiko verŝajne devus akompani iu dokumento pri tiuj kunordigaj demandoj.

4.2.3 Efektivigada plano

Sur la regiona kaj landa niveloj, la efika evoluigado de terminologia planado kaj de retaroj terminologiaj foje dependas grandparte de la ekzisto de diversaj aliaj landaj infrastrukturoj. Oni pli kaj pli konscias, ke la evoluigado de tia infrastrukturo kaj ĉi ties kontribuo al la regiona kaj landa kunlaborado sur la kampo de la informado faciligas la ellaboradon kaj efektivigadon de konvenaj terminologiaj politikoj pri specifaj rimedoj kaj servoj. Tiu paŝo de evoluigado, kune kun ĝustatempa planado kaj haveblo de sufiĉa dungitaro, ludas gravan rolon en la plano por efektivigi la terminologian politikon. Monpeto por efektivigado devas esti realisme proporcia al la celoj, la amplekso kaj la avantaĝoj atendataj. Specife, la efektivigada plano entenu:

- konvenajn strategiojn elektitajn por atingi la diversajn celojn de la terminologia politiko ene de decidita tempodaŭro
- asignon de prioritatoj al diversaj demandoj rilate la terminologian politikon
- asignon de rimedoj cele al la efektivigado de rilataj programoj

- proponon pri mekanismo por kunordigado (en la terminologia politiko mem kaj rilate al aliaj politikoj)

Laŭ la amplekso de la terminologia politiko kaj la komplikeco de la situacio, oni devas bazi la supre menciitajn demandojn pri strategia administrado sur preparaj esploroj pri la:

- starigo de mekanismo por efektiviĝi agadojn, kiuj rilatas al la terminologia politiko
- ellaborado de agoplano por atingi la celojn de la politiko
- provizo per rimedoj por efektiviĝi agadojn, kiuj rilatas al la terminologia politiko
- elpensado de rimedoj cele al periodaj taksoj pri la agoplano kaj alĝustigoj de ĝi

Plejofte, malneta efektivigada plano akompanas la proponon por terminologia politiko.

4.2.4 Presentado de la dokumentoj pri la terminologia politiko kaj de la efektivigada plano

Gravas pristudi la diversajn paŝojn unuflanke dum la verkado de malneto por la fina teksto de la terminologia politiko kaj aliflanke dum la instigado al fakaj komunumoj, kiujn tuŝas subtenado de la agadoj. La fina malneto de la terminologia politiko estu klare verkita, relative mallonga, kaj provizu onin per precizaj kaj ĝisdataj informoj pri la demandoj atentendaj de registaro aŭ de aliaj politikaj decidfarantoj. Tia dokumento bezonatas por:

- uzi kiel bazon cele al verkado de leĝa teksto prezentota por oficiala aprobo
- provizi onin per facila aliro al la demandoj starigitaj en la proponita terminologia politiko
- provizi onin per kompreno pri la eblaj konsekvencoj de la efektivigado de la terminologia politiko rilate kaj agojn entreprenotajn kaj rimedojn bezonatajn

Aparte gravas klare skizi la fortojn kaj malfortojn de la aktuala situacio rilate terminologion en la lando aŭ la lingva komunumo.

Fine oni donu apartan atenton ankaŭ al la enpaĝigo de la dokumento, ĉar ĝi devas taŭgi kiel konsultilo por homoj kiuj ne estas fakuloj pri terminologio (administrantoj, decidfarantoj kaj leĝofarantoj), sed kies tasko estas aprobi la terminologian politikon.

Esence estas ankaŭ elekti la plej favoran tempon, en kiu prezenti novajn politikojn al registaro por aprobo kaj kunordigo kun aliaj politikoj. Nome ĝustatempeco en ĉi tiu punkto povas esti decidohava por sukceso.

4.2.5 Decido pri la definitivaj dokumentoj por la terminologia politiko kaj pri la efektivigada plano

Oni povas oficiale aprobi la definitivan terminologian politikon diversmaniere, t.e. per:

- proklamo aŭ leĝigo (aŭ alispeca jura rimedo)
 - kun referenco al la definitivaj dokumentoj por la terminologia politiko kaj al la efektivigada plano
 - surbaze de la definitiva terminologia politiko (dokumento kaj efektivigada plano)
- oficiala adopto kaj mandato al la efektivigada instanco por ekagi
- aliaj specoj de oficiala aprobo, aparte kiam neregistaraj institucioj starigas siajn terminologiajn politikojn

Gravas ne nur ke la dokumento estu oficiale aprobita fare de administrantoj, politikistoj, leĝofarantoj, decidfarantoj (en NRO-j kaj neprofitcelaj organizaĵoj), la publiko kaj amaskomunikiloj, sed ankaŭ ke ĝi definitive estu vera agoplano, neniel nura paperaĵo, kaj ke la subskribintoj subtenu ĝin en la daŭro de ĝia efektivigado

4.3 FAZO 3: Efektivigado de la terminologia politiko

Dum FAZO 3, oni devas pritondi kaj transformi la plejmulton de la jam preparitaj dokumentoj kaj proponoj en konkretajn agoplanojn kaj aliajn dokumentojn por funkcikapabla planado cele al faciligo de la efektivigado. Tio povas inkluzivi:

- tutkovran administradon de la efektivigado
- planadon de la funkcikapablo kaj organizadon cele al la efektivigado
- planadon de agadoj kampanjecaj kaj diskonigaj

Kiel jam menciite, por sukcesigi la realan efektivigadon de la terminologia politiko, iniciatema kuntrenado de administrantoj, politikistoj, leĝofarantoj, amaskomunikiloj kaj gravuloj en la socio povas esti decida.

4.3.1 Administrado de la efektivigado

Depende de la grandeco de la lingva komunumo, de la komplikeco de la situacio kaj de la amplekso de la terminologia politiko, oni povas administri ĉi ties efektivigadon per:

- unu aŭ pluraj registaraj institucioj
- komitato aŭ alia grupo da homoj
- ekzistanta institucio aŭ organizaĵo, al kiu oni konfidas la taskon
- nove starigita institucio aŭ organizaĵo

Tre gravas decidi pri la instanco, institucio, organizaĵo aŭ alispeca strukturo kiu administru kaj efektivigu la terminologian politikon. Por alpreni tiun decidon, oni atentu pri la rezultoj el la ekzamenoj, taksoj kaj konsultadoj. Kvankam, denove, la kvalito de la bazaj dokumentoj kaj de la unuaj ekzamenoj estas gravega, ankaŭ konsideroj pri la reala politika situacio povas efiki sur la decidon. Ĉiukaze, oni kalkulu pri rezerva elekto ke la nomumita instanco, institucio aŭ organizaĵo ne plenumus sian taskon kiel atendite.

4.3.2 Planado de la funkcikapablo kaj organizado cele al la efektivigado

Surbaze de pli fruaj ekzamenoj kaj rekomendoj, oni devas decidi pri la

- starigo de mekanismo por kunordigado
- ellaborado de agoplano kaj de proceduroj por efektivigi ĝin
- asigno de rimedoj homaj kaj monaj
- efektivigado de kontrolmekanismo

Estas ankaŭ grave difini klarajn taskojn kaj stadiojn, kaj determini la rezultojn, kiuj estu kaj mezureblaj kaj avantaĝaj en nerekta maniero.

Plej verŝajne la efektivigado estu akompanata de mekanismo por taksado, kiu permesas ĝustatempajn korektojn kaj alĝustigojn dum la planado por funkcikapabligi kaj organizi la efektivigadon.


4.3.3 Agadoj kampanjecaj kaj diskonigaj

Dum la fazo de efektivigado, agadoj kampanjecaj kaj diskonigaj gravegas por certigi la sukceson de tiu efektivigado. Se la sinteno de la publiko ĝenerale estas indiferenta aŭ eĉ malamika al la terminologia politiko, ĝi kaj ĉi ties efektivigo finfine malsukcesos. Ĉiukaze, diligenta uzado de la edukada sistemo povas taŭgi. Ĉiukaze, oni zorge kaj sisteme planu, efektivigu kaj pritaksu ankaŭ informkampanjojn kaj diskonigajn agadojn. Estas kerne ne nur kunlabori kun amaskomunikiloj, sed ankaŭ zorge plani informajn aranĝojn kaj agadojn por plenumi la bezonojn kaj atendojn de la loka publiko. Amaskomunikilaj elpaŝoj povas esti radio-elsendoj (kiel komunuma radio), teatraj grupoj (ekz. por sanedukado, aparte en kamparaj aŭ ekonomie malfortaj lokoj), flugfolioj (ekz. en malsanulejoj) k.t.p. La edukado kaj trejnado sur ĉiuj aĝoniveletoj estas esencaj kanaloj por disinformi.

4.4 FAZO 4: Subtenata funkciigado de la terminologia infrastrukturo kaj de la adapta mekanismo por la terminologia politiko

Finfine, la terminologia politiko devas – eĉ dum la stadio de sia efektivigado, kiu reprezentas signifan landan investaĵon – konsideri certigon de la estonta daŭra funkciado de la terminologia infrastrukturo. Oni ne forgesu antaŭvidi mekanismojn por adapti la terminologian politikon kaj la infrastrukturojn laŭ novaj realoj. La kapablo administri ŝanĝojn estas unu grava profesia kompetento, kiun posedu administrantoj de terminologia infrastrukturo.

Ĉi-sube, bildo 2 skizas la fazojn (oni atentu, ke la fazoj kaj taskoj ne nepre okazas sinsekve, sed eventuale okazas parte aŭ foje eĉ tute samtempe):



Bildo 2: resumo de la fazoj

Resumo

La jenaj gvidlinioj baziĝas sur la spertoj pri terminologia planado kaj terminologia politiko, raportitaj el multaj landoj sur diversaj niveloj de ekonomia evoluo en ĉiu mondoparto. La probableco, ke landaj terminologiaj politikoj sukcesas, estas pli granda, se la sekvaj kriterioj plenumiĝas:

- sekvado de integradaj kaj kunordigaj aliroj malfermaj kaj praktikaj
- aktiva subtenado en la administrado de homaj rimedoj por interna dungitaro, por karieroplanado kaj por perreta lernado en rilataj institucioj kaj retaroj
- efektivigado de projektoj por administri sciojn (kunhavigi sciojn) por rilataj institucioj kaj retaroj kiel ankaŭ por kunlaborantaj partneroj enlandaj kaj sur la interlanda nivelo
- tenado de proksima ligo kun novigado en la tekniko kaj transigado de scioj
- certigado de alta grado de klareco kaj de lingvorilataj fakscioj
- elpensado de realigebla kaj daŭrigebla uzomaniero de informado- kaj komunikado-celaj teknologioj, kaj specife de homlingvaj teknologioj
- konsiderado de esplorobazitaj metodoj kaj politikoj
- enplantado de profesia administrado, fido, instigado, komunaj konceptadoj kaj identecoj

La politika, socia kaj ekonomia situacio de lando, kiel ankaŭ la grandeco de iu lingva komunumo, preskaŭ sendube diktas malsamajn alirojn al la evoluigo de terminologia politiko. Tamen, kiel ajn aspektas la specifa situacio, troviĝas kelkaj tre fundamentaj konsideroj, nome:

1) Dediĉado de tempo al ĝisfunda preparado: kiel skizite en ĉi tiu eldonaĵo, la preparaj studoj kaj ĉi ties rezultaj dokumentoj formas la fundamentan bazon por ĉiuj sekvaj agadoj rilate al la terminologia politiko. Ili servas kiel internaj konsultiloj, kaj ankaŭ kiel bazaj argumentodokumentoj, kiujn oni povas disdoni al la publiko. Ju pli detalaj kaj inkluzivaj estas tiuj studoj, des pli tempoŝparaj kaj monŝparaj ili finfine estas. Rigora preparado ankaŭ plifaciligas la postan akiron de subteno por la terminologia politiko enlande kaj sur interlanda nivelo.

2) Lernado el spertoj alilandaj: kompreneble oni zorge studu la sukcesojn kaj modelan praktikadon de la efektivigo de terminologia politiko, sed oni ankaŭ analizu kaj taksu ekzemplojn de malsukceso. Tio povas ege utili en la konceptado, planado kaj efektivigado de terminologia politiko. Per studado de tiuj konkretaj spertoj, oni povas eviti ripeton de eraro, kiun jam faris aliaj landoj. Oni krome povas profiti de modelaj praktikoj.

3) Inkluzivigado de koncernatoj: por ellabori kaj efektivi terminologian politikon, oni bezonas aprobon fare de granda nombro da personoj kaj institucioj. Eĉ se grupo da ŝlosilaj interesatoj lanĉas iniciaton, necesas kreskigi la sferon, tiel ke ĝi entenu ĉiujn gravajn koncernatojn kaj decidfarantojn, kiuj laŭeble devas enplektiĝi en la procedon kiel eble plej frue. Gravas unuflanke jungi la instigopovon kreitan per ampleksa deziro por inkluveco kaj aliflanke eviti negativajn sintenojn, kiuj eventuale aperas, kaze ke koncernatoj sentas sin preteratentataj, ignorataj aŭ neinkluzivigitaj en la procedo por krei terminologian politikon.

4) Enkonduko de kunlaboraj labormetodoj: la plej bonajn rezultojn oni atingas – aparte en la evoluigado de iu lingvo kaj de ties terminologioj – se lingvistoj, terminologiistoj kaj kampo-spertuloj kunlaboras kadre de komitatoj. Tiuj varispecaj spertuloj povas kune kontribui al kompleksa tasko, ĉar kutime ili posedas diversajn fontojn de scioj kaj spertoj, nome:

- kampo-specifaj scioj (naciaj scioj)
- lingvaj scioj (ĝeneralaj kaj lingvo-specifaj scioj)
- terminologiaj scioj (scioj pri labormetodoj, kiuj transpontas la breĉon inter la du supraj specoj de scioj)

Tamen, oni devas tre zorge koncepti la procedurojn kaj la administradon de komputile helpata (perrete distribuita) kunlaboro, por ke ĝi iĝu efika kaj celkonforma. La rilata efektivigado eventuale postulas iom da tempo.

5) Ekplifortigado de homa kapablo kiel eble plej frue: terminologia politiko ne estu plano neŝanĝebla, sed ilo fleksebla, kiu evoluas kaj adaptendas laŭ ŝanĝiĝanta medio. Pro la interfakeco de terminologio kiel scienco kaj de ĝiaj aplikoj, oni bezonas multajn bone trejnatajn spertulojn por efektivi terminologian politikon. Por eviti breĉojn, kiuj endanĝerigus la sukcesan efektivigadon de la terminologia politiko, la klerigado kaj trejnado de tiuj spertuloj komenciĝu kiel eble plej frue.

6) Kreado de konscio tra la tuta lingva komunumo: oni povas garantii la sukcesan efektivigadon de la terminologia politiko nur, se konas kaj akceptas la terminologian politikon tiuj, kiuj devas ĝui avantaĝojn el ĝi.

Aldonaĵo – Terminoj uzataj en ĉi tiuj gvidlinioj

Por faciligi la legadon de ĉi tiuj gvidlinioj, kelkaj el la ĉefaj terminoj estas klarigitaj ĉi-sube. Rilate al normigitaj terminaroj de terminologia laboro, oni bonvolu turni sin al la Internacia Normo de la Internacia Organizaĵo por Normigado ISO 1087:2000, kiu inkluzivas rigorajn difinojn.

faklingvo

speciala lingvo

kampo-specifa lingvo

lingvo, kiun uzas fakaj komunumoj, kun granda aŭ malgranda rolado de terminologio kaj kampo-specifaj lingvokonvencioj

kampo

fako

[kadre de ĉi tiu dokumento] scienc-teknika tereno aŭ alispeca tereno de fakscioj

kampo-specifa komunikado

interhoma komunikado en *kampo*, kiu pragmatasence inkluzivas scienc-teknikajn terenojn kaj alispecajn terenojn de fakscioj

komunikada planado

[kadre de ĉi tiu dokumento] plancela agado lige kun interhoma komunikado kaj kiu inkluzivas lingvoplanadon kaj terminologian planadon, sendepende de la demando, ĉu la pria agado estas striktasence lingve direktita aŭ pli larĝasence organiza, teknika kaj infrastruktura

komunikado

[kadre de ĉi tiu dokumento] interhoma komunikado parola aŭ skriba, aŭ senvorta komunikado

ĝenerala lingvo

ĉiutaga lingvo

lingvo uzata grandparte por ĉiutagaj celoj fare de lingva komunumo

homlingvaj teknologioj

teknologioj, kiuj uzas lingvosciojn por evoluigi komputilajn sistemojn, kiuj kapablas identigi, kompreni, interpreti kaj generi homajn lingvojn en ĉiuj formoj, cele al evoluigado de programaroj, kiuj ebligas al homoj rekte interagi kun komputiloj

landa terminologia politiko

publika strategio ellaborita sur la nivelo de politika decidado en lando aŭ en pli-malpli memstara lingva komunumo (ene de lando aŭ de regiono, kiu situas ambaŭflanke de la limoj de du aŭ pliaj landoj) kun la celo evoluigi kaj reguligi aperantajn kaj ekzistantajn terminologiojn por aro da celoj

lingva kutimo

aro da lingvaj konvencioj, kiujn oni konsideras kiel la komunan lingvan normon de la pria lingva komunumo

RIMARKO: Povas ekzisti ĉiaj variantoj (kiel ekz. dialektoj), kies konvencioj devias de la lingva kutimo.

lingvo-inĝenierado¹⁷

fako, kiu praktikas **naturalingvo-pritraktadon**

lingvoplanado

[kadre de ĉi tiu dokumento] agado, kiu traktas lingvan evoluigadon kaj kiu ampleksas diversajn metodojn kaj alirojn, inkluzive de terminologio kaj leksikografio, terminologia administrado, tradukado kaj tradukada administrado, kaj daŭre pli inkluzive de tekstaro-bazitaj aliroj (termino-eltirado, tekstara analizado por rimarki neologismojn fabrikitajn inter parolantaroj k.t.p.)

RIMARKO: Samkiel en aliaj fakoj, kiuj pritraktas la lingvon, ankaŭ en la lingvoplanado pliiĝas la uzado de homlingvaj teknologioj

malterminigado

malterminiĝado

lingva procezo, laŭ kiu terminoj (kiuj reprezentas nociojn en faklingvoj) ekuziĝas kiel lingveroj (ekz. vortoj) en la respektiva ĝenerala lingvo

MALO: terminigado, terminiĝado

naturalingvo-pritraktado

naturalingvo-prilaborado

agado esplora kaj evoluiga, kiu konceptas kaj konstruas komputilajn programarojn por analizi, kompreni kaj generi lingvojn, kiujn homoj nature uzas

sistemo por terminologia administrado

komputila programaro konceptita kaj konstruita por pritrakti ekskluzive terminologiajn datumojn aŭ terminologiajn datumojn integritajn en alispecajn komputilajn programarojn aplikajn

teknika komunikado

preparado de dokumentoj verkitaj en – aŭ grandparte entenantaj tekston en – iu faklingvo

terminigado

terminiĝado

lingva procezo, laŭ kiu lingveroj (ekz. vortoj) de la ĝenerala lingvo ekuziĝas kiel terminoj (kiuj reprezentas nociojn en la pria faklingvo)

MALO: malterminigado, malterminiĝado

¹⁷ Tradukista rimarko: *lingvo-inĝenierado* estas parto de komputa lingvoscienco (komputila lingvistiko).

terminologia datumbazo

datumbazo, kiu enhavas unulingvajn aŭ plurlingvajn datumojn terminologiajn kaj stariĝas sur la nivelo de iu lando, iu lingva komunumo aŭ iu loko depende de la bezonoj de la koncernaj komunumoj

terminologia ilo

komputila programaro por iel ajn pritrakti terminologiajn datumojn

RIMARKO: Ekzemplo estas *sistemo por terminologia administrado*.

terminologia merkato

merkato el uzantoj kaj provizantoj de terminologiaj produktoj kaj terminologiaj servoj

terminologia planado

plancela agado, kiu evoluigas la lingvon grandparte laŭ la bezonoj kaj postuloj de *kampo-specifa komunikado*

terminologia produkto

rezultaĵo el terminologia agado en la formo de produkto, kiu povas esti kutima terminologia publikaĵo (kiel ekzemple terminologia normo, faklingva terminaro, glosaro, termino-listoj k.t.p.), datumokolekto en elektronika formo (ekz. *terminologia datumbazo*) aŭ *terminologia ilo*

terminologia servo

servo, bazita sur la uzado de terminologiaj principoj, metodoj, datumoj aŭ iloj, kiel ekzemple laŭpeta terminologia esplorado, terminologiaj konsilado kaj trejnado, terminologiaj informado kaj dokumentado, alilokigo de terminologiaj taskoj kaj informservoj, k.t.p.

terminologio

terminologia scienco

fako, kiu esploras la strukturon, formadon, evoluon, uzadon kaj administradon de *terminologioj* en diversaj fakoj, kaj kiu preparas la metodaran bazon por multaj aplikoj

terminologioj

aro da nomindikoj uzataj en iuj faklingvoj

Bibliografio (elekto)

ANTIA, Bassey E. 2000. Terminology and Language Planning: an alternative framework of discourse and practice. Amsterdamo/Filadelfio: John Benjamins.

BAMGBOSE, Ayo. 1991. Language and the nation. The language question in sub-Saharan Africa. Edinburgo: Edinburgh University Press.

COBARRUBIAS, Juan; FISHMAN, Joshua A. [red.]. 1983. Progress in Language Planning. International Perspectives. Berlino/Novjorko: Walter de Gruyter.

COOPER, Robert L. 1989. Language Planning and Social Change. Cambridge.

Department of Arts and Culture of the Republic of South Africa. 2002. National Language Policy Framework. Final Draft. Pretorio: DAC.

GADELI, Karl Erland. 1999. Language Planning: Theory and Practice. Evaluation of language planning cases world-wide. Parizo: Unesko.

GALINSKI, Christian; BUDIN, Gerhard; DE V. CLUVER, August D. 1999. Terminologieplanung und Sprachplanung. En: HOFFMANN, Lothar; KALVERKÄMPER, Hartwig; WIEGAND, Herbert Ernst [red.]. Fachsprachen/Languages for Special Purposes. Ein internationales Handbuch zur Fachsprachenforschung und Terminologiewissenschaft. Berlino/Novjorko: de Gruyter. pp. 2207-2215.

LAURÉN, Christer; MYKING, Johan; PICHT, Heribert. 2002. Language and domains: a proposal for a domain dynamics taxonomy. LSP and professional communication, vol. 2, pp. 23-30.

MONTVILOFF, Victor. 1990. National information policies. A handbook on the formulation, approval, implementation and operation of a national policy on information. Parizo: Unesko (publication PGI-90/WS/11).

RUBIN, Joan; JERNUDD, Björn [red.]. 1971. Can Language Be Planned? Sociolinguistic Theory and Practice for Developing Nations. Hawaii: University Press of Hawaii.

SAGER, Juan C. ; NKWENTI-AZEH, Blaise. 1989. Terminological problems involved in the process of exchange of new technology between developing and developed countries (Study on recent developments in the relationship between science, technology and society in different economic, social and cultural contexts). Parizo: Unesko. Document No. 59.

Unesko. 2003. Recommendation on the promotion and use of multilingualism and universal access to Cyberspace (32C/Resolution 41). Parizo: Unesko.

WRIGHT, Sue Ellen; BUDIN, Gerhard [red.]. 1997 (vol. 1), 2001 (vol. 2). Handbook of Terminology Management. Amsterdamo/Filadelfio: John Benjamins Publishing.

Interlandaj normoj de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO)¹⁸

ISO 639-1:2002 Code for the representation of names of languages - Part 1: Alpha-2 code (ISO 639-1/RA – Registration Authority for the maintenance of the code: Infoterm http://linux.infoterm.org/infoterm-e/raiso639-1_start.htm)

ISO 639-2:1998 Code for the representation of names of languages – Part 2: Alpha-3 code (ISO 639-2/RA - Registration Authority for the maintenance of the code: Library of Congress <http://lcweb.loc.gov/standards/iso639-2/>)

ISO 704:2000 Terminology work – Principles and methods

ISO 860:1996 Terminology work – Harmonization of concepts and terms (under review¹⁹)

ISO 1087-1:2000 Terminology – Vocabulary – Part 1: General Concepts

ISO 1087-2:2000 Terminology work – Vocabulary – Part 2: Computer applications

ISO 1951:1997 Lexicographical symbols particularly for use in classified defining vocabularies (under revision)

ISO 10241:1992 Preparation and layout of international terminology standards (under revision)

ISO 12199:2000(E) Alphabetical ordering of multilingual terminological and lexicographical data represented in the Latin alphabet

ISO 12200:1999 Computer applications in terminology – Machine-readable terminology interchange format (MARTIF) – Negotiated interchange

ISO 12616:2001 Translation-oriented terminography

ISO/TR 12618:1994 Computer aids in terminology – Creation and use of terminological databases and text corpora (under revision)

ISO 12620:1999 Computer applications in terminology – Data categories

ISO 15188:2001 Project management guidelines for terminology standardisation

ISO 16642:2003 Computer applications in terminology – Terminology Markup Framework (TMF)

¹⁸ Tradukista rimarko: tiuj normoj disponeblas ankaŭ en la franca, krom ISO 12199:2000 kaj ISO 16642:2003.

¹⁹ Tradukista rimarko: aperis nova versio en 2007, *ISO 860:2007 Terminology work – Harmonization of concepts and terms*.

Interlandaj normoj preparataj²⁰

ISO/AWI 860 Terminology work – Harmonization of concepts and terms (Revision of ISO 860:1996)

ISO/WD 1951 Presentation/Representation of entries in specialized dictionaries (Revision of ISO1951:1997)

ISO/WD 10241 International terminology standards – Preparation and layout (Revision of ISO 10241:1992)

ISO 12615:2004 Bibliographic references and source identifiers for terminology work

ISO/PWI 12620-2 Computer applications in terminology – Data Categories – Part 2: Terminological data categories (Revision of ISO 12620:1999)

ISO/NP 21829 Terminology of language resource management

ISO/PWI 22128 Quality assurance guidelines for terminology products

ISO/AWI 22134 Terminology in sociolinguistic application

ISO/WD 24613 Lexical Markup Framework (LMF)

²⁰ Tradukista rimarko: la sekvaj dokumentoj estas jam publikigitaj: ISO 860:2007, ISO 1951:2007, ISO 10241-1:2011, ISO 10241:2012, ISO 12615:2004, ISO 22128, ISO TR 22134, ISO 24613:2008 kaj la projektoj ISO/PWI 12620-2 kaj ISO/NP 21829 estis nuligitaj.